



# EL POPOLA ĈINIO

N-ro 7

Julio

1968

En la bonega situacio, en kiu la armeo kaj popolo de nia lando en nombro de centmilionoj firme sekvas la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj antaŭenmarŝas en triumfo por batalakiri la kompletan venkon de la granda proletara kultura revolucio, la granda gvidanto de la proletaro Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ celebris la feston de unuiĝo kaj batalo de la monda proletaro kaj laboranta popolo kune kun la revoluciaj amasoj de la ĉefurbo en la vespero de la 1-a de majo.

Je la 9-a en la vespero, Prezidanto Maŭ venis sur Tian-anmen-pordegon. Prezidanto Maŭ estis treege sana kaj energioplena, kaj, kune kun Vicprezidanto Lin Biaŭ, li intime intervidiĝis kun la respondeculoj de diversaj flankoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA, kaj demokratoj kaj sciencistoj sur la pordego. Ĉie leviĝis ĝojaj huraoj, kien venis Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ. Poste, Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj aliaj respondecaj kamaradoj de CK de KPC rigardis la belege brilajn festajn artfajraĵojn kune kun 500,000 revoluciaj laboristoj, malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj, revoluciaj kadroj, komandantoj kaj batalantoj de PLA kaj junaj ruĝaj gvardianoj.

Ke Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ ĝoje pasigis la vesperon de la Maja Festo kune kun la revoluciaj amasoj, tio estas la plej granda zorgo kaj la plej granda kuraĝigo por la revolucia popolo de la tuta lando, kaj instigas la centmiliono nombran revolucionan popolon de nia lando heroe batali kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj pene, diligente labori por konstrui la grandan socialisman patrion.



# Prezidanto Maŭ Celebris la Feston la Armeo kaj





**kaj Vicprezidanto Lin  
de "1-a Majo" Kune kun  
Popolo de la Ĉefurbo**



Bunte brilas la festaj artfajraĵoj, kaj ĝoje akلامas la vastaj amasoj sur Tian-anmen-placo. La armeanoj kaj popoloj varme celebras sur Tian-anmen-placo la feston de unuiĝo kaj batalo de la tutmonda laboranta popolo, fervore akلامas la brilan venkon de la granda proletara kultura revolucio en nia lando kaj entuziasme huraaas: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!"



# **Deklaro de Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de CK de KPCĈ, por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo**

*(16 aprilo 1968)*

**L**ASTATEMPE, usona nigrulo-  
pastro Martin Luther King estis  
subite asasinita de la usonaj imperiistoj.  
Martin Luther King estis neperfortisto,  
tamen la usonaj imperiistoj ne pro  
tio lin indulgis, sed sange subpremis  
lin per kontraŭevolucia perforto.

Tio ĉi donis profundan lecionon al  
la vastaj amasoj de usonaj nigruloj  
kaj levis ĉe ili novan ŝtormon de  
batalo kontraŭ perforta subpremo, kiu  
envolvis cent kelkdek urbojn en Usono  
kaj estas senprecedenca en la usona  
historio. Ĝi montras, ke en la pli

ol 20 milionoj da usonaj nigruloj latentas ekstreme potenca revolucia forto.

Tiu ĉi batala ŝtormo de la nigruloj okazanta interne de Usono estas okulfrapa manifestiĝo de la tuta politika kaj ekonomia krizo nun alfrontata de la usona imperiismo. Ĝi donas pezan baton al la usona imperiismo implikita en malfaciloj en- kaj eksterlandaj.

La batalo de la usonaj nigruloj estas ne nur batalo de la ekspluatataj kaj subpremataj nigruloj por libereco kaj emancipiĝo, sed ankaŭ nova kla-

rionado al la tuta ekspluatata kaj subpremata usona popolo por batalo kontraŭ la kruela regado de la monopola burĝaro. Ĝi estas grandega subteno kaj kuraĝigo por la batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj por la batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo. En la nomo de la ĉina popolo, mi esprimas firman subtenon al la justa batalo de la usonaj nigruloj.

La rasa diskriminacio de Usono estas produkto de la koloniisma kaj imperiisma sistemo. La kontraŭdiro inter la vastaj amasoj de usonaj

*Pekinaj popolanoj varme aklamas la publikigon de la Deklaro de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo.*





nigruloj kaj la usona reganta grupo estas klasa kontraŭdiro. La usonaj nigruloj povas akiri plenan liberiĝon nur post renverso de la reakcia regado de la usona monopola burĝaro kaj frakaso de la koloniisma kaj imperiisma sistemo. La vastaj amasoj de usonaj nigruloj kaj la vastaj laborantaj popolamasoj inter la usonaj blankuloj havas komunajn interesojn kaj komunan batalcelon. Tial, la batalo de la usonaj nigruloj akiras simpatian kaj subtenon de ĉiam pli multe da laborantaj popolanoj kaj progresemaj personoj inter la usonaj blankuloj. La batalo de la usonaj nigruloj nepre kunligiĝos kun la usona laborista movado, kaj tio likvidos fine la kriman regadon de la usona monopola burĝaro.

En mia *Deklaro por Subteni la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ la Rasa Diskriminacio de la Usona Imperiismo* farita en 1963, mi diris: “La damninda koloniisma kaj imperiisma sistemo prosperiĝis kun la sklavigado de kaj negocado pri nigruloj, kaj ĝi nepre venos al sia fino kun la plena liberiĝo de la nigra raso.” Mi restas nun ankoraŭ firme ĉe tiu ĉi vidpunkto.

Nun la monda revolucio eniris en grandan novan epokon. La porliberiĝa batalo de la usonaj nigruloj estas konsistiga parto de la ĝenerala batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj konsistiga parto de la nuntempa monda revolucio. Mi alvokas: Laboristoj, kamparanoj, revoluciaj intelektuloj en ĉiuj landoj de la mondo kaj ĉiuj



*Revoluciaj junulinoj laŭte krias:  
“For la usonan imperiismon!”*

homoj, kiuj volas oponi la usonan imperiismon, ekagu kaj donu fortan subtenon al la batalo de la usonaj nigruloj! Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu pli kompakte kaj faru longdaŭran kaj intensan atakon kontraŭ nia komuna malamiko, la usona imperiismo, kaj ĝiaj komplicoj! Tio estas certa, ke jam nemalproksima estas la tago de la kompleta disfalo de koloniismo, imperiismo kaj ĉia ekspluata sistemo, kaj tiu de la plena emancipiĝo de ĉiuj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la mondo.



*Vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj de PLA varme akklamas la publikigon de la Deklaro de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo. Ili laŭte krias: "For la usonan imperiismon!" "For la sovetunian reviziismon!" "For la ĉinan Ĥruŝčov!"*

*Vastaj revoluciaj amasoj en Kantono manifestacias.*





# Revoluciaj Popoloj de la Mondo

## Aklamas la Deklaron de

### Prezidanto Maŭ

**P**OST kiam nia granda instruanto Prezidanto Maŭ publikigis sian deklaron en la 16-a de aprilo por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo, laboristoj, kamparanoj, junaj studentoj, gvidantoj de marksism-leninismaj partioj kaj famaj personoj en diversaj landoj publikigis unuj tuj post aliaj deklarojn kaj parolojn varme aklamante, ke la deklaro de Prezidanto Maŭ refoje montris al la usonaj nigruloj kaj la mondaj subpremataj popoloj kaj nacioj la vojon por liberiĝo. Ili esprimis, ke ili subtenos la justan batalon de la usonaj nigruloj per praktika agado kaj disvolvos persistan, furiozan atakon kontraŭ la damninda usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj.

En la 17-a de aprilo, la sekvintan tagon post publikigo de la deklaro de Prezidanto Maŭ, Robert Williams, gvidanto de la usonaj nigruloj, diris en Pekino en intervjuo

kun raportisto de Hinhua, ke tio estas tre ĝusttempa kaj tre grava, ke Prezidanto Maŭ publikigis en la ŝlosila momento de la batalo de la usonaj nigruloj kaj dum la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio deklaron por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo, ke la deklaro de Prezidanto Maŭ stimulos la usonajn nigrulojn fari pli grandskalan batalon kontraŭ perforta subpremo. Li refoje dankis Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la ĉinan popolon pro la subteno al la batalo de la usonaj nigruloj.

Robert Williams montris ke Prezidanto Maŭ rigardas en sia deklaro la batalon de la usonaj nigruloj kiel konsistigan parton de la batalo de la mondaj popoloj por liberiĝo. Tio donis novan signifon al ilia batalo. La deklaro de Prezidanto Maŭ stimulos la justaman popolon de la mondo doni pli da subteno al ilia batalo.



*En 19 aprilo, pli ol cent fremdaj amikoj el 24 landoj de la kvin kontinentoj marŝis sur la stratojn de Pekino por varme akلامي la publikigon de la Deklaro de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo kaj esprimi firman subtenon al la usonaj nigruloj en ilia batalo kontraŭ perforta subpremo.*

Anna Louise Strong, fama usona verkistino en Pekino, diris al reporteroj de Hinhua-novaĵagentejo, ke la deklaro de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo estas tre grava deklaro, kiu certe estos bonvenigata ankaŭ de la progresemaj usonaj blankuloj.

E. F. Hill, prezidanto de la Komunista Partio de Aŭstralio (Marksist-leninista), publikigis deklaron fervore bonvenigante la deklaron publikigitan de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo. Li diris en sia deklaro:

“En la nomo de ĉiuj aŭstraliaj kredantoj de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong mi kore bonvenigas tiun ĉi gran-

dan marksism-leninisman deklaron de Prezidanto Maŭ Zedong.

“Prezidanto Maŭ estas la gvidanto de la monda revolucia movado. Lia subteno al la batalo de la nigra popolo de Usono estas ekzemplo por ĉiuj revoluciuloj. Lia alvoko ‘**Laboristoj, kamparanoj, revoluciaj intelektuloj en ĉiuj landoj de la mondo kaj ĉiuj homoj, kiuj volas oponi la usonan imperiismon, ekagu kaj donu fortan subtenon al la batalo de la usonaj nigruloj!**’ trovas respondon en Aŭstralio kiel tra la mondo.

“Estas necese studi serioze kaj efektiviigi la deklaron de Prezidanto Maŭ. Ĝi estas akra analizo pri la monda revolucia situacio. Ĝi estas inspira alvoko al agado.”

Deklaro de V.G. Wilcox, ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Novzeland-



do, publikigita en la nomo de la Tutlanda Sekretariejo de la Komunista Partio de Novzelando, estas titolita *La Deklaro de Prezidanto Maŭ Estas Alvoko al Agado*. Li diris en sia deklaro: "Li ankaŭ refoje montris, ke la subpremado al la nigra popolo de Usono estas klasa subpremado, kaj ke la bazaj interesoj de tiel blanka kiel nigra laboranta popolo kuŝas en la komuna batalo por meti finon al la regado de la monopola kapitalista klaso."

La delegacio de la Centra Komitato de la Indonezia Komunista Partio publikigis deklaron subskribitan de ĝia estro Jusuf Adjitorop. La titolo de tiu deklaro estas *La Tutmondaj Popoloj Firme Unuiĝu kaj Plifortigu la Subtenon al la Usonaj Nigruloj!*

Kuraĝi Anzaj, japana revolucia maldestrulo, diris en intervjuo kun ĉinaj reporteroj ke la deklaro de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo estas granda doku-

mento vere trapenetrita per la revolucia teorio de marksism-leninismo.

Mecaj, avangarda laboristo de la Stalin-a Ŝpinteksejo en Tirana, Albanio, diris: Ni laboristoj fervore aplaŭdas la deklaron de Prezidanto Maŭ kaj firme subtenas la heroan batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo. Ni vidas en la deklaro de Prezidanto Maŭ la proletaran helpon de la ĉina popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio al la batalo de la usonaj nigruloj. Tre gravan signifon havas tio, ke tiu ĉi deklaro estas publikigita en tia momento kiel nun. Ĝi ne nur mobilizas kaj kuraĝigas la usonajn nigrulojn kaj la tutan usonan popolon leviĝi por oponi kontraŭ la barbara subpremado de la usona reakciularo, sed ankaŭ kuraĝigas la popolojn de aliaj kapitalismaj landoj leviĝi por renversi la reakcian burĝaran regadon.

Huynh Thi Thanh Truc, laboristino en Thanglong-a Cigareda Fabriko de Hanojo



*Kun profunda amo al Prezidanto Maŭ, diverslandaj amikoj laŭte kantas la kanton Marnavig' Dependas de l' Stiristo.*

kiu iam partoprenis la militon kontraŭ la franca koloniismo kaj poste estis regrupigita kadro en Nordon el Sudo de Vjetnamio, diris: “La deklaro de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo ne nur havas profundan influon por la batalo de la usonaj nigruloj, sed ankaŭ estas granda subteno kaj kuraĝigo al la nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo. Ĉar tiu, kiun ni kaj la usonaj nigruloj kontraŭstaras, estas unu komuna malamiko — la usona imperiismo. Ni vjetnama popolo havas nenian iluzion pri la tiel nomata paco de la usona imperiismo. Ni firme kondukas la batalon laŭ la instruo de onklo Ho, kaj ĉiu el la 31-miliona vjetnama popolo fariĝos heroa batalanto por nacisavo kontraŭ la usona imperiismo.”

Laboristo en Bamako, Malio, diris, ke la deklaro de Prezidanto Maŭ “tre ekscitas nin, ĉar Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto kaj granda instruanto de la mondaj revoluciaj popoloj, ĉiam zorgas pri la diverslandaj subpremataj kaj ekspluatataj popoloj.”

Maljuna laboristo de fabriko en Bukaresto, Rumanio, diris: “Kamarado Maŭ Zedong plej zorgas pri la sorto de la usonaj nigruloj kaj ĉiuj subpremataj koloraj rasoj de la mondo. Nun, ĝuste kiam la usona imperiismo alfrontas malfacilojn post malfaciloj enlande kaj eksterlande, kaj la usonaj nigruloj levas grandskalan batalon kontraŭ perforta subpremo, la deklaro de Prezidanto Maŭ kuraĝigas la batalvolon de la usonaj nigruloj kaj montras al ili la direkton de batalo.”

Juna laboristo en Sofio, Bulgario, eksaltis pro ekscitiĝo aŭdinte la ĝojigan novaĵon pri publikigo de la deklaro de Prezidanto Maŭ. Li diris kun emocio, ke la bulgaraj revoluciuloj firme subtenas la deklaron de kamarado Maŭ Zedong, kaj ke kamarado Maŭ Zedong estas granda gvidanto kaj lia deklaro plene esprimas ilian deziron.

Beqiraj, sekretario de partia filio de la agrikultura kooperativo Nova Ĉinio en la regiono de Tirana, Albanio, diris, ke post lego de la deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo la membroj de tiu kooperativo unuanime aprobas kaj subtenas tiun ĉi deklaron, kaj samtempe ili sentas senkomparan indignon kontraŭ la barbara politiko de rasa diskriminacio kaj subpremado, kiun la usona imperiismo longtempe praktikas kontraŭ la nigruloj, kaj ke ili kredas, ke la justa batalo de la nigruloj certe venkos.

Vicestro kaj milica direktanto de la Agrikultura Kooperativo de Vjetnama-Ĉina

*Aŭdinte la Deklaron de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo, la afrika amiko diras emocie: “La granda deklaro de Prezidanto Maŭ montras al la usonaj nigruloj la direkton de antaŭenmarŝado.”*







*Batalantoj de la Nacia Korpuso de Civila Defendo de Kongolando (B.) varme akklamas la Deklaron de Prezidanto Maŭ por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo. Post studo de tiu granda deklaro ili varme krias: “Vivu armita batalo!” “Vivu la penso de Maŭ Zedong!”*

Amikeco diris: “Ni fervore bonvenigas kaj firme subtenas la deklaron publikigitan de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo. Prezidanto Maŭ plej zorgas kaj subtenas la batalon de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la mondo. La deklaro de Prezidanto Maŭ estas granda kuraĝigo ankaŭ por ni. Por respondi tiun ĉi deklaron de Prezidanto Maŭ ni devas plifortigi la batalon kaj diligente okupiĝi pri produktado kun firma decido komplete venki la usonan imperiismon.”

Maljuna grizhara kamparano en Bulgario diris, ke li scias, ke la ĉina popolo dankas sian liberiĝon al la armita batalo gvidita de kamarado Maŭ Zedong, ke li subtenas la starpunkton de la deklaro de kamarado Maŭ Zedong kaj ke la usonaj nigruloj kondukas tre mizeran vivon kaj ili akiros liberiĝon nur per perforta batalo.

Studento de medicina kolegio en Kolombio diris, ke la deklaro de Prezidanto Maŭ sciigis al ili, ke ĉiuj, kiuj vere deziras venki la usonan imperiismon, devas fari decidon sekvi la direkton, kiun Prezidanto Maŭ montris jam antaŭlonge: Nur uzante armilojn, nur pere de la revolucia perforto oni povos faligi la kontraŭrevolucion perforton de la usona imperiismo.

Tadaŝi Sajama, revolucia studento de Japanio, diris: “La deklaro de Prezidanto Maŭ pliigas la kuraĝon de la junuloj kaj studentoj, kiuj staras ĉe la plej antaŭa fronto de la patriota batalo kontraŭ la usona imperiismo en Japanio.” La revoluciaj popoloj de la mondo unuiĝu kaj faru persistan, furiozan atakon kontraŭ la komunaj malamikoj — la usona imperiismo kaj ĝiaj komplikoj, komplete faligu la usonan imperiismon kaj batalu por liberiĝo de la tuta homaro!

# Granda Kuraĝigo al la Komuna Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo

—Ĉefartikolo de la “Voĉo de Popolo”, la organo de CK  
de la Albana Partio de Laboro, la 20-an de aprilo

**L**A deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong por subteni la batalon de la usonaj nigruloj estas alia forta kuraĝigo kaj granda stimulo al la usonaj nigruloj kaj usona laboristaro kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj revoluciaj intelektuloj de diversaj landoj kaj nacioj en ilia pli intense kaj pli decideme farata batalo kontraŭ la usona imperiismo. La korekta kaj akrevida analizo, kiun li faris pri la stato de la usonaj nigruloj kaj ilia liberiga batalo, malproksime transiris la kadron de la demando mem. Kiel granda kaj ĉiam senŝanceliĝa revoluciulo kaj elstara marksist-leninisto, kamarado Maŭ Zedong malkovris kaj analizis la nunajn fundamentajn kontraŭdirojn de la usona imperiismo kaj montris la ĝustan revolucionan vojon, kiu nepre ebligos ne nur al la nigruloj sed ankaŭ al la tuta usona laborista klaso akiri sian liberiĝon kaj forskui la kapitalisman ekspluaton kaj imperiisman katenon.

La usona imperiismo estas la plej agresema imperiismo en la historio. En- kaj ekster-lande ĝi praktikas la barbaran politikon de rasa apartigo, kruela ekspluato al

laboranta popolo kaj subpremo al diverslandaj popoloj. La ribelo kaj rezisto de la usonaj nigruloj montras, ke ili ĉiam pli konscias, ke imperiismo nepre devas esti ekstermita, se ili volas esti liberigitaj el tiu sistemo. Martin Luther King, gvidanto de nigruloj, estis pacifisto. Li revis pri liberiĝo de la nigruloj sen uzo de perforto. Eĉ tian utopiiston la usonaj rasistoj tamen malice murdis. La morto de Martin Luther King rompis ĉiajn revojn de milionoj da nigruloj, kiuj opiniis, ke la usonaj grandaj kapitalistoj ekhavos bonkorecon kaj volonte toleros la liberiĝon de la nigruloj. La nuna batalo de la usonaj nigruloj kaj iliaj bataloj en la lastaj jaroj montras, ke ili ne povos liberiĝi de ekspluatado nek akiri liberon, se nur regos ankoraŭ la kapitalisma sistemo. Ili ne estas plu protestantoj kun malplenaj manoj, sed leviĝas kiel batalantoj. Tiu ĉi fakto havas grandan signifon. Tio montras, ke en la akra batalo kontraŭ la imperiistoj kaj rasistoj, la nigruloj konsciigas politike kaj estas mobilizataj por akiri siajn rajtojn sen timo al oferoj. Tio signas gravan turnopunkton en la batalo de la usonaj nigruloj kaj komencon de nova



epoko en ilia batalo por emancipiĝo, libereco kaj rajtoj.

Sed ne necesas klarigo por evidentigi, ke por ĝisfunde solvi la demandojn de la nigruloj, ilia batalo sola ne sufiĉas, eĉ se la batalo estas heroo kaj firma. Kamarado Maŭ Zedong tute korekte emfazis, ke la batalo de la usonaj nigruloj nepre kunligiĝos kun la usona laborista movado, kaj tio likvidos fine la kriman regadon de la usona monopola burĝaro. La usonaj laboristoj, ĉu de la blanka raso, ĉu de la nigra raso, havas komunajn interesojn kaj komunan celon, t. e., faligi la reakcian regadon de la burĝaro kaj detruigi la koloniisman kaj imperiisman sistemon.

Prezidanto Maŭ Zedong logike kaj dialektike montris, de kiu vidpunkto oni devas konsideri, klarigi kaj kompreni la novan ŝtormon de la batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ la kontraŭrevolucia perfortado fare de la imperiistoj-rasistoj, kaj kiel taksu korekte ĝian grandan internacian signifon. La deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong diras: **“La batalo de la usonaj nigruloj estas ne nur batalo de la ekspluatataj kaj subpremataj nigruloj por libereco kaj emancipiĝo, sed ankaŭ nova klarionado al la tuta ekspluatata kaj subpremata usona popolo por batalo kontraŭ la kruela regado de la monopola burĝaro. Ĝi estas grandega subteno kaj kuraĝigo por la batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj por la batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.”**

La deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong esprimas la fortan subtenon de la granda, sepcent-miliona ĉina popolo al la usonaj nigruloj. Ĝi kuraĝigas kaj stimulas ilian batalon kontraŭ la usona imperiismo. Ĝuste kiam la usonaj nigruloj pli ol iam ajn bezonas la apogon de la tutmondaj revoluciaj fortoj kaj popoloj, la batala subteno de la ĉina popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio plifortigas la kuraĝon de la usonaj

nigruloj en ilia batalo kaj ilian fidon pri venko.

La starpunkto de la popola Ĉinio rilate al la kontraŭimperiisma batalo de la usonaj nigruloj ankoraŭfoje montras la grandan revolucion ralon ludatan hodiaŭ de la popola Ĉinio en la mondo. Ĉiuj popoloj, kiuj luktas por nacia kaj socia liberiĝo kaj batalas kontraŭ imperiismo kaj reakciularo, ĉiam ricevas la sinceran, fratan kaj fidindan subtenon de la ĉina popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Maŭ Zedong. Ili ricevas novajn kuraĝigon kaj stimulon por plifortigi siajn revoluciajn batalojn kaj por decideme batali ĝis komplete venko super la malamiko.

Prezidanto Maŭ Zedong alvokas, ke **laboristoj, kamparanoj, revoluciaj intelektuloj en ĉiuj landoj de la mondo kaj ĉiuj homoj, kiuj volas oponi la usonan imperiismon, ekagu kaj donu fortan subtenon al la batalo de la usonaj nigruloj!** Tiu ĉi alvoko havas historian signifon kaj certe trovos varman kaj fervoran bonvenigon en la vicoj de la granda armeo, kiu batalas kontraŭ imperiismo kaj reakciularo kaj klopodas por akiri nacian liberiĝon kaj venkon de socialismo.

La revoluciuloj de diversaj lokoj respondos la alvokon de Prezidanto Maŭ per plivastigo kaj plifortigo de la batalo kontraŭ imperiismo kaj diversaj ekspluatataj sistemoj kaj por akiri la liberiĝon de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj. La diverslandaj revoluciuloj senĉese donas fortajn batojn al la usona imperiismo en diversaj lokoj, malkovras kaj kontraŭstaras la agresan planon kaj trompan politikon de la usona imperiismo. Tio estas ne nur por la intereso de la popolo de la propra lando, sed ankaŭ helpas al la laborista movado kaj nigrula movado de Usono, por ekstermi la usonan imperiismon, la estron de la monda reakciularo, en ĝia nesto. Tio estas utila al la liberiĝo de la diverslandaj popoloj kaj al la monda revolucio nuntempa. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ

Zedong montris, la batalo de la usonaj nigruloj estas ankaŭ konsistiga parto de la nuna monda revolucio. Precize pro tio, la deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong estas nova, granda kuraĝigo al la popoloj de la tuta mondo por ke ili pli firme unuiĝu kaj pli decide kontraŭstaru la subpremado de sia komuna malamiko la usona imperiismo, koloniismo kaj diverslandaj reakciuloj. Ĝi estas granda kuraĝigo por la plifortigo de la batalo kontraŭ reviziismo estrata de la sovetunia reviziista kliko — la plej intima aliancano de la usona imperiismo kaj la plej fidela subtenanto de ties agresa plano kontraŭ la libereco kaj sendependeco de diverslandaj popoloj. Tio helpas al la novaj marksism-leninismaj fortoj kaj al la veraj revoluciuloj de diversaj landoj plifortigi siajn vicojn kaj pli decide oponi kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, ĝis kiam ili estos komplete ekstermitaj.

Prezidanto Maŭ diris: “**Jam nemalproksima estas la tago de la kompleta**

**disfalo de koloniismo, imperiismo kaj ĉia ekspluata sistemo, kaj tiu de la plena emancipiĝo de ĉiuj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la mondo.**” Tio plenigas la popolojn de la kvin kontinentoj, farantajn hodiaŭ grandan, plenampleksan batalon kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj aliancanoj, per optimisma spirito kaj plifortigas ilian fidon pri venko kaj pri la nepre venonta, lumplena socialisma estonteco.

La albana popolo varme akلامas la deklaron de Prezidanto Maŭ Zedong subtenantan la batalon de la usonaj nigruloj kaj rigardas ĝin kiel elstaran kontribuon de la ĉina popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio al la revolucia batalo de la diverslandaj popoloj kontraŭ ilia komuna malamiko — la usona imperiismo, kaj kiel novan kuraĝigon al la senlaca batalo kaj laboro de la diverslandaj popoloj por la granda kaj nevenkebla afero de revolucio kaj socialismo.

GJULIU:

## Batalu, Fratoj


# Nigruloj en Usono!

**K**VAZAŬ uragano, grandskala kaj senprecedenca batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo ekĉirkaŭvolvis Usonon je la 4-a de aprilo, 1968. Ekde la vespero de tiu tago, la nigruloj en diversaj lokoj de Usono konkure iris al stratoj por ataki la reakciajn armeanojn kaj policianojn kaj bruligi la butikojn, kiuj ekspluatistis nigrulojn. En kelkaj mallongaj

tagoj, la batalfajro jam tralekis 125 grandajn kaj malgrandajn urbojn en la tuta lando. Vaŝingtono, la ĉefurbo de Usono, Novjorko, Ĉikago, Detroito, Baltimoro kaj aliaj grandaj urboj ĉiuj dronis en ĥaoso. La rapida disvolviĝo de la perforta batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo donis pezan baton al la reakcia regado de la usona imperiismo en la lando



*En 1965, nigruloj de la usona urbo Bogalusa manifestaciis por egaleco kontraŭ rasa diskriminacio. La bildo montras manifestaciantojn brave marŝantajn.*



kaj ĝia agresa politiko en eksterlando. Tio ankoraŭ pli profunden dronigis la usonan imperiismon en embarason interne kaj ekstere, kiam ĝi jam troviĝis en senelirejo pro fiasko en la agresa milito kontraŭ Vjetnamio kaj la krizo de usona dolaro.

Tiu ĉi batalŝtormo de la usonaj nigruloj eksterordinare peze batis la usonan imperiismon. La nigruloj, kiuj estas kruele ekspluatataj kaj subpremataj de longa tempo, jam vekiĝis. Plenaj de forta indigno kontraŭ la reganta kliko kaj la rasistoj de Usono, ili sturmis sur stratojn spite al la barbara subpremado de la plene armitaj faŝistaj armeanoj kaj policanoj. Ili bruligis multnombrajn incendiojn de venĝo kaj

detruis nombron post nombro da butikoj kaj lombardejoj de la blankaj ekspluatantoj. Multaj urbegoj, kie ekspluatantoj serĉas amuzojn, ĉiuj fariĝis batalejoj vualitaj de densaj fumo kaj plenaj de disrompitaj tegoloj kaj brikoj. Kaj en la luktado kontraŭ la faŝistaj armeanoj kaj policanoj, la amasoj de nigruloj refoje montris sian bravecon kaj obstinecon kaj sentiman spiriton al oferoj. Nigruloj embuskis ĉie kaj la faŝistaj armitaj armeanoj kaj policanoj estis tiel timigitaj kaj maltrankviligitaj ke herboj kaj arboj montriĝis por ili malamiĝoj. Ne povis eskapi la punon de la nigruloj eĉ Vaŝingtono, la nesto de la usona imperiismo, kie fajrolumo briligis la ĉielon



*Kun arda indigno junaj nigruloj de la usona urbo Pittsburg luktas kontraŭ plene armitaj nacigvardianoj.*

kaj ruliĝadis densaj fumo, kaj ĉirkaŭ la Blanka Domo multaj butikoj de la blankaj rasistoj estis tute frakasitaj.

Tiu ĉi batalo de nigruloj kontraŭ perforta subpremado markis pluapaŝan bankroton de neperfortismo kaj pluapaŝan profundigon de la revolucia perforta batalo en la korojn de la nigrulaj amasoj. Ĉiam pli multe da nigrulaj amasoj komprenas, ke ili povas akiri liberecon kaj emancipiĝon nur per revolucia perforto kontraŭ la kontraŭrevolucia perforto. Nigrulo-pastro Martin Luther King estis neperfortisto, tamen, li mortis sub la perforto de la blankaj rasistoj. Tiu fakto mem ja estas viva leciono. Post la okazo de tiu sanga perfortaĵo, iu nigrulo indigne diris: “De nun, forgesu ni neperfortecon!” Tiu vorto reprezentis la voĉon de nigrulaj amasoj en milionoj, kiuj volas liberecon kaj emancipiĝon.

Nia granda instruanto Prezidanto Maŭ saĝe montris iam: “**En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo.**” La usona imperiismo praktikas ekstreme reakcian regadon enlande kaj faras kruelajn ekspluatadon kaj subpremadon super la vastaj amasoj de usonaj laboruloj, precipe super la pli ol dudek milionoj da usonaj nigruloj.

De longa tempo, sub la duobla subpremado nacia kaj klasa, la usonaj nigruloj vivas en la plej malalta tavolo de la usona socio. Ilia salajro estas plej malalta, dum la senlaboreco plej alta, kaj miloj kaj miloj da nigruloj baraktas sur malsata linio jaron post jaro. La indigno akumulita en la koroj de la nigruloj estas kvazaŭ pulvejo, kiu tuj eksplodos ĉe ektuŝo de fajrero. La intereso de la vasta laboranta popolo el la usonaj blankuloj estas identaj al tiuj de la usonaj nigruloj.



Kun la pli kaj pli intensa ekspluatado kaj sklavigado de la usona monopola burĝaro al la vasta usona laboranta popolo, ĉiam pli multe da blankaj laboruloj partoprenas la batalon de la nigruloj, kaj en multaj lokoj ili enviciĝas inter la nigrulojn en iliaj manifestacioj kaj strikoj. La kombiniĝo de la batalo de la usonaj nigruloj kun la laborista movado de Usono certe plirapidigos la disfalon de la krima regado de la usona monopola burĝaro.

La batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ la rasisma subpremado estas konsistiga parto de la ĝenerala batalo de la tutmonda popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj potenca subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj de la mondo. La usona imperiismo agresas kontraŭ fremdaj landoj kaj subpremas kaj ekspluatas la enlandan popolon, tial, ĝi estas komuna malamiko de la usona kaj tutmondaj po-

poloj. Kaj en la batalo kontraŭ tiu ĉi plej feroĉa komuna malamiko, la usonaj nigruloj, vjetnama popolo kaj ĉiuj subpremataj popoloj de la mondo reciproke subtenas kaj stimulas sin unu alian: Ĉiu peza bato donita de la heroo vjetnama popolo al la usonaj agresantoj estas grandega subteno al la revoluciaj popoloj de la mondo, inkluzive de la usonaj nigruloj; kaj ankaŭ la heroo batalo de la usonaj nigruloj multe helpas la vjetnaman popolon kaj diverslandajn popolojn de la mondo en ilia batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ili estas batalamikoj militantaj ŝultro-ĉe-ŝultre sur komuna fronto, kaj venko sur ĉiu aparta batalejo akcelos la venkon de la ĝenerala batalo kontraŭ la komuna malamiko.

De ĉiam, la usona reganta kliko traktas la batalon de la nigruloj per la du kontraŭrevoluciaj rimedoj de sanga subpremado

*Vekiĝintaj usonaj nigruloj indigne renversis la aŭton de blankularasisto por pagi al ilia diskriminacio kaj subpremo en la pasinteco.*



kaj politika trompado. Fronte al la nuna nekontraŭstarebla batalŝtormo de la nigruloj, la ekstreme timigita usona reganta kliko freneze sendis 50-60 mil armitajn armeanojn kaj policianojn kaj eĉ tankojn, kirasaŭtojn kaj helikopterojn por subpremi la nigrulajn amasojn. Grandaj nombroj da nigruloj estis mortigitaj, miloj vunditaj kaj pli ol dudek mil maljuste arestitaj. Samtempe, la usona reganta kliko urgeme elmetis la tiel nomatan leĝoprojekton de "civilaj rajtoj", vane provante tromplogi la publikon per nepagigebla ĉeko ke "neniu diskriminacio estu farata al nigruloj en loĝado".

Sed, estas tute vane ke la usona reganta kliko provas estingi la batalan fajron de la ĉiam pli vekigantaj usonaj nigruloj per la

du kontraŭrevoluciaj rimedoj. La vasta nigrula amaso estas neterurebla per faŝisma subpremado, nek trompebla per ĉiaj belaj vortoj. En la lastaj jaroj, la prospera disvolviĝo de la batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremado jam plene tion pruvis, kaj tion certe pruvos ankaŭ la venonta historio.


La forto de pli ol dudek milionoj da nigruloj estas nevenkebla. Ili certe ĝisfunde frakosas fine la katenojn sur siaj korpoj, entombigos la imperiisman sistemon de Usono kaj komplete liberigos sin kun la subteno de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo kaj batalante ŝultro-ĉe-ŝultre kun la laboranta popolo el la usonaj blankuloj.

Batalu, fratoj nigruloj en Usono!

*Ĉie sur la stratoj de Vaŝingtono furiozas fajregoj bruligitaj de la usonaj nigruloj por oponi kontraŭ perforta subpremo.*







*Vekiĝintaj usonaj nigruloj manifestacias alte tenante la portreton de Prezidanto Maŭ kaj heroe batalas kontraŭ la usonaj reakciuloj.*

GAŬ ĈAŬ:

# La Batalo de la Usonaj Nigruloj en Vigla Disvolviĝo

**D**EPOST la 8-a de aŭgusto 1963, en kiu nia granda instruanto Prezidanto Maŭ publikigis la *Deklaron por Subteni la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ la Rasa Diskriminacio de la Usona Imperiismo*, la usonaj nigruloj plue vekiĝis kaj foje-refoje faris bravajn batalojn kontraŭ la rasa diskriminacio. Ili ne timas perfortan

subpremon, brave marŝas antaŭen unuj sekvan-  
te aliajn kaj donas pezajn batojn al la usona imperi-  
ismo. Nun, kun leviĝo de la batalo de la usonaj  
nigruloj kontraŭ perforta subpremo, pli kaj pli  
multe da nigruloj sin vicigis en la armeon kondu-  
kantan tiun batalon, kaj kunfluis en nerezisteblan  
torenton. Vidu jenajn koncizajn faktojn pri la

bataloj de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo ekde 1963 ĝis nun.

### EN 1963

En la fino de aŭgusto, pli ol 250,000 usonaj nigruloj venintaj el 50 ŝtatoj de Usono, elmigrintaj nigruloj kaj blankuloj subtenantaj la batalon de nigruloj okazigis en Vaŝingtono senprecedence grandskalan "marŝon por libero" kontraŭ rasa diskriminacio.

### EN 1964

En kelkdek ĉefaj urboj kaj urbetoj kiaj Novjorko, San-Francisko kaj Ĉikago eksplodis unu post alia grandskala batalo de la nigrulaj amasoj kontraŭ rasa diskriminacio en eduko, loĝado, laborado kaj aliaj flankoj. En julio, la nigruloj de Harlem-distrikto en Novjorko komencis la preludon de grandskala batalo kontraŭ perforta subpremo per armitaj fortoj. En ĝi miloj da nigrulaj amasoj indigne svarmis al stratoj por protesti kontraŭ sovaĝa mortigo de nigraj infanoj fare de policianoj, kaj luktadis kontraŭ miloj da armitaj policianoj en ses tagnoktoj, prenante ŝtonojn, bastonojn, bruligajn botelojn kaj aliajn objektojn kiel siajn armilojn. Sub kuraĝigo de la brava batalo de la nigruloj en Harlem, nigruloj en multaj urboj disvolvis divers-skalajn batalojn kontraŭ perforta subpremo.

### EN 1965

En januaro, la nigruloj de Selma-urbo de Alabama-ŝtato en suda Usono levis grandskalan longdaŭran luktadon por batalakiri voĉrajton. Pli ol 100,000 popolanoj en pli ol 20 urboj inkluzive Vaŝingtonon, Novjorkon, Ĉikagon, San-Franciskon kaj Detroiton respektive okazigis grandskalajn manifestaciojn por doni spiritan helpon al batalo de la nigruloj en Selma. En aŭgusto, por protesti kontraŭ la senkaŭza aresto de junaj nigruloj fare de policianoj, la nigruloj de Watts-distrikto de Los-Anĝelo ne timis la perfortan subpremon, kaptis al si armilojn de la malamikoj kaj disvolvis haltigan militon kontraŭ ĉirkaŭ 20,000 armitaj policianoj, kiu daŭris dek tagojn kaj noktojn. Samtempe, ankaŭ en Ĉikago eksplodis la batalo kontraŭ perforta subpremo, la plej grandskala en la lastaj pli ol dek jaroj.

### EN 1966

En marto kaj majo, la nigruloj de Los-Anĝelo foje-refoje prenis armilojn kaj faris bravan lukton

kontraŭ reakciaj policianoj por protesti kontraŭ la mortigo de nigruloj fare de policianoj kaj por kontraŭbatali rasan persekuton. En julio, la nigruloj en Ĉikago kondukis la kvar-kvin-tagan batalon kontraŭ perforta subpremo de ĉirkaŭ 1,000 armitaj policianoj. En somero de tiu jaro, la bataloj de nigruloj kontraŭ perforta subpremo eksplodis en 38 grandaj kaj mezgrandaj urboj.

### EN 1967

En aprilo, la nigrulaj studentoj de Naŝvilo en Tennessee-ŝtato ribelis kaj rezistis kontraŭ la armita subpremo de pli ol 400 policianoj. En la meza tagdeko de julio, la nigruloj de Newark-urbo en New Jersey-ŝtato faris intensan luktadon kontraŭ pli ol 7,000 armeanoj kaj policianoj plene armitaj dum kvar tagnoktoj, por protesti senkaŭzan areston de nigruloj fare de policianoj. En la lasta tagdeko de julio, pro la senkaŭza kaptado de homoj fare de policianoj, la nigruloj de Detroito levis la senprecedence grandskalan batalon kontraŭ perforta subpremo. Miloj kaj dekmiloj da nigruloj kun armiloj en la manoj brave luktadis kontraŭ ĉirkaŭ 20,000 armeanoj kaj policianoj ekspeditaj de la reakcia usona registaro, bruligis pli ol 1,300 lokojn tra la tuta urbo kaj metis la urbon en paralizon. En aŭgusto, la amasoj de nigruloj en la usona ĉefurbo Vaŝingtono unuafoje eksplodigis la armitan batalon kontraŭ perforta subpremo. En la tuta somero de tiu jaro, la incendio de batalo de nigruloj kontraŭ perforta subpremo brulis tra pli ol 90 urboj en dekoj da ŝtatoj de Usono.


### EN 1968

En la kuranta jaro, la batalo de usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo eksplodis pli frue. En la komenco de februaro, la nigrulaj studentoj de Orangeburg en South-Carolina-ŝtato disvolvis bravan luktadon kontraŭ reakciaj armeanoj kaj policianoj.


En la 28-a de marto, pli ol 6,000 nigruloj de Memphis en Tennessee-ŝtato okazigis manifestacion por subteni la pli ol 1,000 persiste strikantajn stratpurigistojn kaj faris heroan luktadon kontraŭ pli ol 4,000 armeanoj kaj policianoj senditaj por subpremo. En la vespero de la 4-a de aprilo, post kiam la nigrulo-pastro Martin Luther King estis asasinita de blankuloj-rasistoj, la amasoj de nigruloj de diversaj lokoj en Usono leviĝis unuj post aliaj kaj disvolvis la senprecedence grandan batalon kontraŭ perforta subpremo. Nur en kelkaj tagoj, ĝi jam etendiĝis ĝis 125 urboj.



*Spite al subpremado de la polico, indignantaj usonaj nigruloj en Vaŝingtono brave iris sur la straton kaj frakasis la montrofenestrojn de multaj butikoj de blankuloj, kiuj malestimas kaj subpremas la nigrulojn.*



*Vekiĝintaj usonaj nigruloj heroe batalas por libereco kaj emancipiĝo.*








*Kun altaj fumkolonoj, la batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo arde brulas en Vaŝingtono, la nesto de la usona imperiismo. Johnson, la ĉefo de la usona imperiismo, timtremas kaj mienas tute senhelpe.*



ĜEN JI:

# La Mizera Stato de Usonaj Nigruloj



*Jen estas la familio de farmulo de Johnson en Alabama, kiu vivas mizere sub lia kruela ekspluatado.*

**A**MIKOJ, ĝuste en Usono, kiu ĉiam pretendas “demokration” kaj “liberecon”, regas rasa diskriminacio malofta en la mondo. La vastaj amasoj de nigruloj tie vivas sklavan vivon eĉ malpli bonan ol la brutan. Ni vidu sube la mizeran staton de la vastaj amasoj de nigruloj en Usono.

## ALTEGA SENLABORECO

La senlaboreco de la nigruloj en Usono estas tri-kvaroble pli alta ol tiu de la blankuloj. Laŭ la statistiko publikigita de la Buroo de Labor-Statistiko de Usono en februaro ĉijare, preskaŭ triono de la neblankaj junuloj en aĝo de laborpreno (inter kiuj plejparto estas nigruloj) en 20 plej grandaj urboj, restas senlabore.

Pro tio, ke la mastroj de agrikulturejoj en suda Usono uzas maŝinojn por fizikaj laboroj, ĉiujare centmiloj da usonaj nigruloj devas forlasi siajn

hejmajn lokojn kaj aliĝi al la armeo de senlaboruloj en urboj. Laŭ la okcidentaj burĝaraj ĵurnaloj, de 1950 ĝis 1966 ĉ. 5,200,000 nigruloj estis devigitaj migri de la sudaj vilaĝoj en urbojn.

## MALALTA LABORPAGO KAJ MALBONAJ LABORKONDIĈOJ

La laborpago al la usonaj nigruloj estas multe malpli alta ol tiu al la blankaj laboristoj farantaj la saman laboron, kaj ankaŭ iliaj laborkondiĉoj estas multe pli malbonaj. La meznombra enspezo de la familioj de nigruloj estas je 52% malpli multa ol tiu de blankuloj. La meznombra salajro de nigruloj estas nur triono ĝis duono de tiu de blankuloj. Sole el la diferenco de laborpago inter la nigraj kaj la blankaj laboristoj, la usona monopola kapitalo ĉiujare elpremas de la nigruloj superprofiton de almenaŭ 14 miliardoj da dolaroj.

## MALBONEGAJ LOĜKONDIĈOJ

Nigruloj estas devigataj loĝi en mizeraj kvartaloj de grandaj urboj de Usono. Iliaj loĝkondiĉoj estas treege malbonaj. En la kvartaloj por mizeruloj de 12 grandaj urboj de Usono loĝas svarme ok milionoj da nigruloj (kiuj konsistigas du kvinonojn de la nigruloj en tiuj urboj). En la mallumaj kaj kadukaj domoj de nigrula kvartalo de Watts-distrikto, Novjorko, loĝas pli ol 80,000 nigruloj. 90% de la domoj, en kiuj ili loĝas, estis konstruitaj antaŭ la Dua Mondmilito kaj jam tute kadukiĝis loĝnetaŭgaj. En kvartalo por mizeraj nigruloj en Harlem, Novjorko, svarmas ĉ. 500,000 nigruloj. Preskaŭ duono de la domoj tie estis konstruita en la komenco de la 20-a jarcento, kaj ili estas tre mallumaj kaj malsekaj. Ĉie amasiĝas ruboj kaj ratoj, dum la lupago estas eksterordinare alta.

## PLI MALLONGA VIVDAŬRO DE NIGRULOJ

La procento de la morto de la nigrulaj beboj atingas 15%, t. e., trioblon de tiu de la blankulaj. La statistiko de la usona registaro diras, ke la mez-nombra vivdaŭro de la nigruloj estas multe malpli longa ol tiu de la blankuloj.

## KANONFURAĜO POR AGRESA MILITO EN VJETNAMIO

La usonaj imperiistoj devige sendis grandegan nombron da nigruloj al suda Vjetnamio kiel kanonfuraĝon en la agresa milito kontraŭ Vjetnamio. La nigruloj konsistigas ĉ. 10% de la tuta loĝantaro de Usono, sed 25% de la soldatoj de la usona agresa armeo estas nigruloj. Inter la mortigitoj kaj vunditoj de la paraŝutaj soldatoj, kiuj suferas la plej grandajn perdojn, la nombro de nigruloj okupis pli ol 40%.

## POLITIKAJ RAJTOJ MALRESPEKTATAJ

Ankaŭ la politikaj rajtoj de la vastaj amasoj de usonaj nigruloj estas malrespektataj. En multaj sudaj ŝtatoj de Usono, la nigruloj ankoraŭ nun estas senkaŝe senigitaj je balotrajto aŭ rigore limigitaj pri ĝi. Antaŭ elektado la nigrulaj balotantoj devas trapasi la obstaklojn de tiel nomataj "kultura ekzameno" kaj "intelekta ekzameno". Dekmiloj kaj dekmiloj da nigruloj, kiuj ne havis

la ŝancon viziti lernejon pro malriĉeco, estas senigitaj je balotrajto. Eĉ se iuj sukcesas partopreni balotadon, ili ankoraŭ renkontos minacon, baton aŭ eĉ pafmortigon.

## TUTE MANKAS GARANTIO DE VIVO

La vivo de usonaj nigruloj havas nenian garantion. En ĉiu momento, ili povas esti arestataj kaj mortigataj de la reakciaj policanoj. La "Ku-Klux-Klan", formita el blankaj rasistoj, estas faŝisma organizo, kiu speciale persekutas la nigrulojn per teroraĵo, linĉo, forkapto, sekreta murdo kaj aliaj kruelaj rimedoj.

Jen estas la "civilizacio" kaj "libereco", kiujn laŭte prikantas la mastroj de Wall-strato. Sed la trompaj artifaĵoj de Johnson kaj similaj jam antaŭlonge estis malkaŝitaj mem de iliaj interna kaj ekstera politikoj agresadi eksterlande kaj kruele subpremi kaj ekspluati la vastajn amasojn de nigruloj kaj blankaj laboruloj enlande.

*Tre mizeran vivon havas la usonaj nigruloj.  
Jen nigrula infano suferanta rakiton.*





# Insigno kun Portreto de Prezidanto Maŭ

*Kiel trezor', kiel trezoro  
Insigno kun portret' de Prezidanto Maŭ  
Estas metita en la ligna malgranda skatolo;  
Kiel trezor', kiel trezoro  
Kaŝiĝas ĝi en lia ruĝa koro.*

*Samkiel ruĝa suno,  
L' insigno kun portret' de Prezidanto Maŭ  
Potence disradias per brilega lumo.  
Prilumas ĝi por li la tramarŝotan vojon!  
Kaj portas al li varmon en la koron!*


*La reakciular' blokadas strikte la revolucion penson  
Kaj teruriĝas eĉ pro eta la insigno,  
Ĉar ĝi surhavas la portreton de l' giganto,  
Kiu tremigas ilin je ekvido!*

*Eĉ se pli strikte l' reakciular' blokados,  
Verkojn de Prezidanto Maŭ ni tamen studos;  
Kaj ni plej energie propagandos  
La ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong,  
Kiel ajn nin intense ili persekutos!*

*Tiu malgranda insigneto  
Entenas ja en si senfinan forton!  
Vidante sur ĝi la portreton,  
Li sentas varmajn fluojn en la koro!*

*Pensante pri l' instruoj de la Prezidanto  
Li sentas sin plenplena de vivenergio  
Kaj ĵuras en korfundo al la Prezidanto:  
"Por ĉiam agos mi laŭ via instrukcio  
Kaj dum la tuta viv' dediĉos min al la revolucio!"*

# Novaj Kontribuoj de Labormodeloj



*Lju Julan (dekstre) interŝanĝas sperton de studo de verko de Prezidanto Maŭ kun komunumanoj.*

**G**ENG Ĉangsuo, Vang Guofan, Li Kjuanŝoŭ, Vang Jukun, Lju Julan kaj Hing Janzi, labormodeloj de Hebej-provinco fame konataj tra la tuta lando kaj aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, faris novajn kontribuojn en la granda proletara kultura revolucio, alte tenante la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong, firme starante ĉe la flanko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, strikte sekvante la grandan strategian aranĝon de Prezidanto Maŭ, aktive ludante la rolon de avangardo, intime interligante kaj unuiĝante kun la vastaj revoluciaj amasoj. Nun ili estas respektive elektitaj kiel vicĉefkomitatanoj, konstantaj kaj ordinara komitatanoj de provinca, subprovinca aŭ gubernia revolucia komitato.

## STURMANTOJ EN LA KLASBATALO

La labormodeloj estas pioniroj sur la batalfronto en produktado kaj sturmantoj en la klasbatalo. Disvolvante la kuraĝan spiriton de revolucio, ili faris bravan bataladon kontraŭ la plenmana da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj agentoj en diversaj partoj de Hebej-provinco.

Geng Ĉangsuo, la fama labormodelo de la tuta lando, kiu batalis 25 jarojn sur la vojo de agrikultura kooperigo, indigne malkovris kaj kritikis, per siaj propraj travivaĵoj en batalado inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, la damnindajn krimagojn de kapitalisma restaŭrado fare de la ĉina Ĥruŝĉov en diversaj historiaj periodoj. Li ne nur faris akuzon kaj kritikon kune kun la hejmlokaj revoluciaj amasoj, sed ankaŭ skribis pli ol kvardek



dazibaŭojn kaj ilin sendis al la subprovinca, provinca kaj centra komitatoj de KPĈ por malkovri kaj kritiki la krimagojn de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Sub lia kondukado, la kadroj kaj komunumanoj de Vugung-brigado de Ĵaŭjang-gubernio, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, ĉiuj aktive partoprenis en la amasa revolucia kritikado por ĉiuflanke elimini la venenan influon de la ĉina Ĥruŝĉov en la kamparo.

En la jaro 1955, en sia raporto "Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo" Prezidanto Maŭ laŭdis la agrikulturan produktan kooperativon, starigitan de malriĉkamparanoj Vang Jukun, Vang Hiaŭki kaj Vang Hiaŭpang de Nanvangĝuang-brigado, Anping-gubernio. Prezidanto Maŭ diris: **"La direkto, montrita de tiuj ĉi tri familioj de malriĉkamparanoj, estas la direkto de la kvincent milionoj da kamparanoj de la tuta lando."** La ekzemplo de tiu ĉi heroa kooperativo multe kuraĝigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de la tuta lando. Ĝi ludis gravan rolon en akcelado de efektivigo de la tutlanda agrikultura kooperigo. La klasaj malamikoj intencis forigi tiun ruĝan standardon, starigitan persone de Prezidanto Maŭ. Ili kalumniis mensogante: "Falsa estas la kooperativo de tri familioj de malriĉkamparanoj", kaj agitis iujn, kiuj ne konis la realon, ĉirkaŭtaksi la tutlandan labormodelon Vang Jukun.

En tiu ĉi batalo Vang Jukun pripensis antaŭ ĉio ne siajn personajn gajnon kaj sekurecon, sed la **"direkton de la kvincent milionoj da kamparanoj de la tuta lando"**. Rememorinte pri tio, ke li feliĉe sidis apud Prezidanto Maŭ ĉe la bankedo en Huaj-

jentang-halo je la 7-a de februaro, 1956, kaj pri la senlaciĝa instruo de Prezidanto Maŭ al li, tuj li sentis sin plena de neelĉerpeblaj fortoj kaj kuraĝo. En profunda nokto, li trovis siajn malnovajn batalamikojn Vang Hiaŭki kaj Vang Hiaŭpang kaj emocie diris al ili: "Ni devas resti aplombaj, stari firme kaj ne cedi antaŭ la atakoj! Ni nepre devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj prizorgi la ŝtatajn aferojn. Nun, la klasaj malamikoj intencas nei la **'direkton de la kvincent milionoj da kamparanoj de la tuta lando'**, ni devas batali ĝisfine kontraŭ ili!" Per feraj faktoj Vang Jukun kaj liaj batalamikoj severe refutis antaŭ la vastaj amasoj la diversajn absurdajn diraĵojn disemitajn de la klasaj malamikoj kaj ĝusttempe malkovris iliajn intrigojn kaj artifikojn. Per pluraj debatoj la okuloj de la vastaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis klarigitaj, ili distingis la pravon de la malpravo, firme unuiĝis, frakasis la frenezan atakon de la klasaj malamikoj, kaj garantiis la venkan kondukon de la granda kultura revolucio de Nanvangĝuang-brigado.

Lju Julan, la aktivulino en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj sekretario de la partia filio de Dongliuŝangu-brigado de Hiabaŭsi-komunumo en Linhi-gubernio, firme persistante ĉe starpunkto en la granda kultura revolucio, frakasis la forlogadon, mensogojn kaj malakordigajn ruzojn fare de la klasaj malamikoj, kaj kune kun la vastaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj lanĉis furiozan atakon al la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. En komenco de la granda proletara kultura revolucio, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en komploto kun la diabloj kaj demonoj en la socio

*Geng Ĉangsuo (la unua maldekstre) transportas sterkon kune kun komunumanoj.*



instigis iujn, kiuj ne konis la realon, fari sub iu preteksto politikan persekuton al Lju Julan. Sed firme tenante en sia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ “**Ĉio reakcia ja ne falos, se vi ĝin ne faligas**”, en la akra kaj komplika klasbatalo Lju Julan, kiu ĉiam agas laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ dum la lastaj dekkelkaj jaroj, kune kun la vastaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kuraĝe staris sur la plej fronta linio, batalis vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe kontraŭ la klasaj malamikoj kaj akiris unu venkon post alia.

## LA UNUAJ EN EFEKTIVIGO DE LA PLEJ NOVAJ INSTRUKCIOJ DE PREZIDANTO MAŬ

La labormodeloj la unuaj certigis efektivigon de la plej novaj instrukcioj kun senlima fidelo kaj profunda klasamo al Prezidanto Maŭ. Sub helpo de la PLA-anoj ili organizis kursojn de la penso de Maŭ Zedong kunlige kun la elstaraj kaj urĝaj demandoj en revolucio kaj produkto de sia loko, mobilizis la vastan komunumanaron kreive studi

*Li Ŝunda (dekstre) revenas post kamplaboro kun komunumano.*



kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj forte akcelis la grandan revolucion unuiĝon kaj revolucion triflankan kombiniĝon.

Vang Guofan, la konata agrikultura labormodelo de la tuta lando kaj estro de la “kooperativo de malriĉuloj”, fame konata pro sia rimarkinda sukceso en strebado al prospero per sinapogo sur la propraj fortoj, honorita de Prezidanto Maŭ kiel la “**miniaturado de nia lando**”, firme tenas en la koro la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri ĝusta traktado al la kadroj. Li vizitis kvar komunumojn, mobilizis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por aktive helpi la kadrojn de la baza nivelo preni sur sin la pezan taskon teni la revolucion kaj stimuli la produkton. Por ke pli frue fondiĝu la gubernia revolucia komitato, li meminiciate iris al la gubernia instanco de Zunhua, plurfoje interparolis kun la kadroj de buroestra kaj sekciestra rangoj, lernis kune kun ili la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, forte tenis la klasan edukadon, disvolvis rememorajn aktivadojn pri la amaroj antaŭ la Liberiĝo, kuraĝigis ilin iri en la amasojn kaj fari novajn kontribuojn por la popolo. Tiel pli ol okdek procentoj de la kadroj de la buroestra kaj sekciestra rangoj elpaŝis kaj enviciĝis inter la revoluciaj amasoj.

En komenco de la granda kultura revolucio la anstataŭa sekretario de la antaŭa gubernia partia komitato praktikis la burĝaran reakcian linion. Sub minaco de malmultaj malbonuloj li eksigis Vang Guofan el la Partio. Sed, plej zorgante la intereson de la tuto, Vang Guofan ne kulpigis lin pri la maljustaĵo, kion li persone suferis. Li meminiciate interparolis kun tiu ĉi kadro tri tagojn kaj du noktojn por helpi lin forigi sian “timon”, plialtigi sian konscion kaj sinliberigi de la mankoj kaj korekti la erarojn. Vang Guofan sincere diris: “Pro timemo vi praktikis la burĝaran reakcian linion kaj eksigis min el la Partio. Vin mi ne kulpigas, ni devas koncentrigi la malamon al la ĉina Ĥruŝĉov.” Poste, tiu ĉi kadro sisteme kritikis siajn mankojn kaj erarojn, kaj estis kompreneble pardonita de la vasta revoluciularo kaj elektita kiel la ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Zunhua-gubernio.

## ANTAŬIRANTOJ EN TENO DE REVOLUCIO KAJ STIMULO DE PRODUKTO

Responde al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**”, la labormodeloj gvidis post si la vastajn amasojn de komunumanoj batalakiri riĉan rikolton



*Kamarado Vang  
Guofan inter junaj  
batalantoj de ruĝa  
gvardio*



en agrikulturo kun entuziasmo vekita en la granda proletara kultura revolucio.

Nangunlonggoŭ-brigado de Pingŝan-gubernio estas ruĝa standardo de la tipo de Daĝaj. Laŭ la kolektiviga vojo montrita de Prezidanto Maŭ kaj kun la ter-kaj ĉiel-transforma heroeco de la monttranslokiga Malsaĝa Avo, la komunumanoj fosis surmonte unu serpentuman kanalon post alia, konstruis pecojn super pecoj da nivelaj ŝtupkampoj, ŝanĝis neirigaciatajn parcelojn en akvokampojn, transformis sablejon en fekundan teron, kunigis kampetojn en kampegojn, kaj turnis malaltproduktajn kampojn en altproduktajn, — tiamaniere ili transformis la sterilan valon en riĉan novtipan kamparon socialisman. Dum la lastaj dekkelkaj jaroj, la produkta kvanto de grenoj senĉese plialtiĝis. La pomua produktkvanto antaŭensaltis de 200 aŭ 300 ĝinoj (1 ĝino =  $\frac{1}{2}$  kg.) en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 1,009 ĝinoj en la jaro 1964. Intencante frapi la aktivecon de la vastaj amasoj en konstruado de socialismo, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon asertis absurde, ke la produktkvanto estas falsa. Ili sendis homojn mezuri la teron kaj kontroli la produktkvanton. Sed la fakto donis al ili fortan vangfrapon. Tiuj fiuloj ne volis ĉesi post sia fiasko kaj faris decidon “en 3 jaroj ne publikigi en ĵurnaloj la sukcesojn en Nangunlonggoŭ”. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Nangunlonggoŭ tamen sukcesis firme rezisti la nigran venton oponantan la socialismon, turnis la

malamon en forton por produkto kaj pli energie sinĵetis en produkton por strebi al prosperiĝo. Dum la granda kultura revolucio ili altigis la pomuan grenan produktkvanton ĝis pli ol 1,200 ĝinoj en du sinsekvaj jaroj, kaj kreis la plej altan nivelon en la historio.

Kia forto ebligis al ili akiri la riĉan rikolton kaj en revolucio kaj en produkto? La labormodelo kaj sekretario de partia filio Li Kĵuanŝoŭ diris: “Ĉar Prezidanto Maŭ montris al ni la direkton kaj la penso de Maŭ Zedong donis al ni la forton.” Sub kondukado de Li Kĵuanŝoŭ, kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ fariĝis moro inter la komunumanoj de Nangunlonggoŭ-komunumo. Ĉe vilaĝfinoj kaj kamprandoj, en kaj ekster kortoj, ĉie iras la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la batalo de amasa revolucia kritiko. En la lasta vintro, sub la gvido de Li Kĵuanŝoŭ la vastaj amasoj de komunumanoj de Nangunlonggoŭ forhakis rokojn kaj plie konstruis dek muojn da irigaciataj kampoj inter rokoj surmonte kun senkompara revolucia entuziasmo, kaj metis firman bazon por akiri pli grandan riĉan rikolton en la kuranta jaro.

## REVOLUCII SENĈESE KAJ KONSCIE

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**Ne sidu en la antaŭa merito sed faru novan kontribuon**”, la labormodeloj rigardis sin samtempe kiel revolucion movforton kaj objekton de revolucio. Kun

la spirito de senĉesa revoluciado kaj volonte sin teni kiel humilajn lernantojn de la amasoj, ili eniris profunde en la amasojn, serioze kritikis siajn mankojn kaj erarojn, akcelis la revoluciigon de sia ideologio kaj intimigis sian rilaton kun la vastaj revoluciaj amasoj.

La labormodeloj profunde komprenas, ke la antaŭaj sukcesoj estas la frukto sub nutrado de la penso de Maŭ Zedong, ke ili estas akiritaj per la saĝo kaj forto de la kolektivo. Tial ili ne nur povas ne memkontentiĝi pro laŭdoj, ne perdi kuraĝon pro kritiko, sed ankaŭ povas fari memkritikon konscie. La sesdekok-jara Geng Ĉangsuo multfoje skribis dazibaŭojn por esprimi sian deziron akcepti kritikon de la amasoj; Vang Jukun kaj Lju Julan meminciate faris memkritikon inter la amasoj; Vang Guofan kaj Li Kjuanŝoŭ iris de familio al familio de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj por aŭskulti opiniojn. Ilia konscia revolucia spirito akiris varman subtenon de la vastaj revoluciaj amasoj, kaj ili refoje hardis sin en la revolucia forno de amasa movado.

Hing Janzi, la vicsekretariino de la partia filio de Sigeĝuang-brigado de Baŭdi-gubernio, kiu partoprenis agrikulturon en sia hejmloko post abiturientiĝo en la urbo, ricevis ofte laŭdojn sed malofte kritikojn en la pasinteco. En komenco de la granda kultura revolucio la amasoj publikigis kelkajn kritikajn dazibaŭojn pri ŝi, kaj ŝi jam ĉagreniĝis neelteneble. Poste ŝi ripetfoje lernis la instruon de

Prezidanto Maŭ “Ni komunistoj devas iri en la mondon kaj sperti ventojn kaj pluvojn”, kaj rememoriginte sian kreskadon ŝi komprenis, ke ĉiam ekzistas batalo inter la du linioj koncerne al la demando de kulturado de daŭrigantoj de la revolucio. En la pasinteco, Prezidanto Maŭ akceptis ŝin trifoje, stimulis ŝin ligiĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj enradikiĝi, flori kaj fruktodoni en la amaso. Sed, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon intencis fari ŝin daŭriganto de la burĝaro. Dufoje vizitante gubernion Baŭdi por disŝpruci venenon, la kontraŭrevolucia reviziisto Ĝoŭ Jang koruptis la junajn intelektulojn partoprenintajn el urbo en agrikulturon, per ĉaso de famo kaj alta rango, kuraĝigante ilin multe legi kaj skribi romanojn por fariĝi literatoroj. Rememorante la karan instruon de Prezidanto Maŭ kaj el la fakto de klasbatalo ŝi profunde komprenis, ke oni devas ĉiam aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, iri la vojon de ligiĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj, ĉiam esti humilaj lernantoj de la amaso, se oni volas fari sin daŭrigantoj de la proletara revolucia afero. Kompreninte, ke la amasaj kritikoj ĝuste estas helpado al ŝi, ŝi tuj skribis dazibaŭon por esprimi sian deziron akcepti kritikojn de la amaso. Kaj ŝi meminciate kritikis siajn mankojn kaj erarojn, aŭskultis la amasajn kritikojn humile, kaj aktive tenis la revolucion kaj stimulis la produkton. La komunumanoj diris: “Rigardu! Nia Janzi (‘Janzi’ signifas hirundon en la ĉina lingvo — *la trad.*) ekflugis denove!”

*Hing Janzi (la tria de dekstre en la fronto) kaj ŝiaj junaj brigadanoj studas vortojn de Prezidanto Maŭ dum laborpaŭzo.*






# *Ginggang-montaro,*

## *Lulilo de Revolucio*



Huangjanggie estas unu el la 5 plej gravaj enirejoj de Ginggang-montaro. En 30 aŭg. 1928, la heroaj Laborist-kampanara Ruĝa Armeo kaj popolo de Ginggang-montaro frakasis plurajn atakojn de la kuomintangaj reakciuloj kaj venkis en la defendo de Huangjanggie.



Ginggang-montaro, la revolucia sanktejo de la ĉina popolo, estas la unua revolucia bazloko fondita persone de nia granda instruanto Prezidanto Maŭ. Antaŭ 40 jaroj, li gvidis la Laborist-kampananan Ruĝan Armeon, starigis tie la revolucian ruĝan standardon kaj malfermis la brilan revolucian vojon de sieĝo de la urboj per la kamparo kaj transpreno de regpotenco per armitaj fortoj.







▲ La bildo montras la templon en Maüping, en kiu okazis Partia Kongreso de la Hunan-Gianghi-a Limregiono sub la prezido de Prezidanto Maŭ.  
Ciping estis la centro de la revolucia bazloko de Ginggang-montaro. Ĉi tie troviĝis siatempe sidejoj de la partia, politika kaj armea oficejoj de la Ruĝa Armeo.



La revolucia spirito de Ginggang-montaro herediĝas senfine de generacio al generacio. Jen kamarado Zoŭ Venkaj, estro de la antaŭa Daging-a Taĉmento de Ribeluloj sur Ginggang-montaro, rakontas al batalantoj de PLA pri la batalado ĉe Ginggang-montaro.





Ĉen Hinfa



Jue Hiutaj



Lu Jingdi



Jan Ĉengli

\* ..... \*

\* KUNSIDO \*

\* ..... \*

## Revolucii por Ĉiam Firme Sekvante Prezidanton Maŭ

*La Avangarda Elektromotora Fabriko estas ordinara fabriko en Ŝanhajo. En la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko tre diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj persiste kondukadas amasan revolucion kaj batalon. Kiam la penso de Maŭ Zedong estas ekposedita de la amasoj, ĝi tuj naskas gigantan materian forton. La amasoj venkis malfacilon post malfacilo, faris multajn avangardajn kreojn kaj turnis sian fabrikon en unu el la avangardaj fabrikoj amase aperintaj en la granda kultura revolucio.*

— La Red.

**Ĉen Hinfa** (respondeculo de la Revolucia Komitato de la fabriko):

Antaŭ ĉio ni kune deziru longan longan vivon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Nun ni studu la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ (ellasitajn).

Hodiaŭ mi invitis vin al la kunsido laŭ la komisio de la gazeto *El Popola Ĉinio*, por ke la atingoj akiritaj de la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj, oficistoj kaj kadroj de nia fabriko en la granda proletara kultura revolucio sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong estu mallonge diskonigitaj al la esperantaj legantoj per la gazeto. Nu, bonvolu diri kion vi volas!

### MIRAKLO EN PRODUKTADO

**Jue Hiutaj** (membro de la Revolucia Komitato de la fabriko):


Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de nia fabriko zorgas pri la ŝtataj aferoj, aktive partoprenas la grandan kulturalan revolucion kaj ri-

cevas profundan edukon en tiu ĉi intensa klasbatalo. Ni kore pli amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong. La fratoj-laboristoj de la tuta fabriko aplikis en produktado sian ĝisĉielan revolucion entuziasmon elvokitan de la granda kultura revolucio kaj estigis serion da ŝanĝoj en la fizionomio de la produktado de nia fabriko. Ja viveca ekzemplo pri tio estas la produkta miraklo aperinta en la dua sezono de la pasinta jaro.

Laŭ la bezono de la ŝtato, la gvida instanco postulis, ke la produkto de nia fabriko en la dua sezono estu grandskale pliigita ol en la unua. Post kalkulo oni trovis, ke mankis al ni 80,000 laborhoroj por ĝustatempe plenumi la donitan taskon. Forte maltrankviliĝis la kadroj, kiuj respondecas pri produktado. Kaj en tiu tempo ni ricevis aldone taskon urĝe fabriki 280 elektromotorojn bezonatajn por ekipaĵoj por presado de verkoj de Prezidanto Maŭ. La mendantoj postulis varliveron en la tria sezono. Ni faris unuapaŝan planon, laŭ kiu la motoroj estos liveritaj en la unua monato de la tria sezono. Konsiderante,



*Gu Gigu*



*Juan Jongsu*



*Fej Deliang*



*Jan Liven*

ke la periodo inter la menda dato kaj la tempo de livero de la varoj estas senprecedence mallonga en nia fabriko, ni pensis, ke la plano estas jam sufiĉe avangarda.

Sed kiam la plano estis prezentita al la laboristoj, ĉi tiuj opiniis, ke ĝi estas konservativa. La laboristoj esprimis unuanime: La menditaj 280 elektromotoroj nepre devas esti liveritaj en la dua sezono, por ke la presotaj trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ venu kiel eble plej frue en la manojn de la ĉina kaj la aliaj revoluciaj popoloj de la mondo. Laŭ la nova postulo, la nombro de la mankantaj laborhoroj al la dua sezono pligrandiĝis je pli ol 30,000 kaj la totalo de la mankantaj laborhoroj atingis pli ol 110,000. Sed la firmega decido kaj altega memfido de la laboristoj forte kuraĝigis nin. Do ni tuj listigis la produktajn taskojn de la dua sezono kaj ilin publikigis, por ke la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko ilin diskutu kaj mem faru aranĝojn por plenumo. Tiamaniere, la iniciativo de la amasoj estis plene elvokita kaj baldaŭ jam difiniĝis certigaj aranĝoj por la efektiva de la plano. Sed en la pasinteco, por solvi tian problemon oni povis fari nenion alian ol pligi homfortojn.

#### **Lu Jingdi (planistino):**

Por plenumi la planon, ni disvolvis la spiriton de ĝenerala kunlaboro.

Antaŭe pri produktado de elektromotoroj sin okupis la tria laborejo. Nun ĉiuj aliaj laborejoj meminciate ĝin helpis. Antaŭe, la unua laborejo respondecis nur pri provfarado de novaj produktajoj, ĉifoje ĝi ne nur sendis dek kelkajn kamaradojn por helpi la trian laborejon, sed ankaŭ akceptis de ĝi taskon de prilaboro de maŝinpartoj. La ripara grupo de elektra ekipaĵoj de la kvara laborejo meminciate iris al la tria laborejo por ĝin helpi en riparado de la pontargano. Kaj iuj la-

borgrupoj, kiuj ne ricevis laboron el tiu tasko, meminciate postulis partoprenon.

#### **Jan Ĉengli (juna laboristo):**


Ĝuste tiamaniere nia malvarme-prilabora grupo akiris por si la taskon per peto. Tiam la gvidantaro de la laborejo ne konsentis doni plian taskon, konsiderante ke la taskoj antaŭe asignitaj al ni jam estas sufiĉe pezaj. Sed la laboristoj en nia grupo diris: "Nerezigneble. Produkti elektromotorojn bezonatajn por rapide presi trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ ja estas plej grava politika tasko, kiel ni povus ne preni sur nin tian honoran taskon!" Ni do pretigis sur skarлата papero Petoskribon por Batalo kaj ĝin sendis al la Revolucia Komitato de la laborejo tamtamante kaj tamburante, por petakiri taskon. Vidante ke kun tiel firma decido venas la laboristoj, la Revolucia Komitato do akceptis nian postulon. Ricevinte la novan taskon, ĉiuj cerbumadis dum laboro por renovigi la produktan teknikon, senĉese plialtigis la laborproduktivecon por pli bone plenumi la taskon.

#### **Lu Jingdi:**


La brava spirito de la kamaradoj-laboristoj malestimi la malfacilojn kaj konkure preni sur sin pezajn taskojn tre kortuŝis la kamaradojn en la ne-produktaj sekcioj. Ankaŭ ni rompis la limon de nia respondeco kaj iris tien, kie la laboro bezonis helpon. Iuj meminciate helpis la provizan sekcion en urĝigo al koncernaj entreprenoj liveri bezonatajn materialojn, aliaj iris deĵori en laborejoj, kaj triaj partoprenis respektive helpan laboron konforme al la karakterizaĵoj de sia propra okupo.

Tiamaniere la produkta tasko de la dua sezono estis superplenumita kaj la totala produktvaloro kreskis je 68 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de 1966. Tio estis produktnivelo neniam atingita de post fondiĝo de la fabriko! Kun la





Jang Ĉunfu



Vej Junĝong

klasa sentimento de senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de nia fabriko streĉe laboris kaj pliiĝis la totalan produktvaloron de 1967 je 21.4 procentoj ol tiu de 1966, kaj je 24 procentoj ol tiu de 1965. Ankaŭ la kvalito de la produktaĵoj multe plialtiĝis. Kaj krome estis superplenumita la produkta plano de la unua sezono de la kuranta jaro.

### REVOLUCIA AMASA KRITIKO BONE KONDUKITA

**Ĝu Ĝiguo** (maljuna laboristo, estro de produkta grupo):

En la granda kultura revolucio, kun la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de nia fabriko senlace kondukas amasan revolucionan kritikon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov kiel la estro. La laboristoj profunde komprenas, ke la amasa revolucia kritikado mem estas elstarigo de la proletara politiko, tial ju pli streĉas la produkta laboro, des pli firme ni tenas la amasan kritikadon. Persiste akcelante produktadon per revolucio, ni ne nur akiris grandajn atingojn en produkto, sed, multe pli grave estas, ke pere de la revolucia amasa kritiko ili ankaŭ plialtiĝis la konscion por ĉiam revolucii firme sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Nia fabriko iam estis prenata de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kiel grava punkto por oferti nigran reviziisman varon. Ili babilaĉis absurde, ke “politiko estas nemanĝebla”, “kunveno ne povas krei produktaĵon”, kaj kiu povas plenumi sian taskon, tiu estas “bona laboristo” kaj povas ricevi premion. Ili volis, ke ni laboristoj ne zorgu pri politiko sed plene dronu en produktado. Tiu-

tempe ni jam trovis tion nekomprenebla. Ni laboristoj ja estas la mastroj de la ŝtato, kial do ni ne zorgu pri politiko, pri la ŝtataj aferoj? En la granda kultura revolucio, ni ĉiam pli klare vidas, ke la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov kiel la ĉefo intencis miskonduki nin sur la vojon de kapitalismo per la nigraj reviziismaj varoj kiaj “materia stimulado” kaj “tekniko sur la unua loko”, kaj gvidi nin iri returnen por ankoraŭfoje vivi en suferoj. Travidinte la vipuran intrigon de la ĉina Ĥruŝĉov, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj ĉiuj leviĝis por malkaŝi kaj kritiki liajn krimojn. Precipe iuj kamaradoj el nia helpa laborgrupo, kiuj estis venenitaj de la ideo “tekniko sur la unua loko”, opiniis ke la laboroj de nia grupo estas tre bagatelaj kaj deziris transposteniĝi al laborgrupo postulanta pli da tekniko. Kun tia deziro ili ja ne povis havi sufiĉan entuziasmon en produkto. Post kritikado pri la krimo de la ĉina Ĥruŝĉov en kolportado de nigra reviziismo, ili decidis elimini la egoismon en sia kapo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

**Juan Ĵongfu** (juna laboristo):

Por bone konduki la amasan revolucionan kritikon, ni konkeris multajn malfacilojn. Iuj maljunaj laboristoj, kies nivelo de klereco estas malalta, petis alies helpojn en skribado de kritikaj artikoloj kaj dazibaŭoj. Post la amasa revolucia kritiko, iuj laboristoj, kiuj estis trompitaj de la ĉina Ĥruŝĉov, sentis profunde ke ili vanigis la esperon de Prezidanto Maŭ, kaj decidis ĉiam aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam pli bone konduki revolucion kaj produktadon.

**Fej Deliang** (teknikisto):

Ja tre ĝenerala estas la konscia partopreno de la laboristoj en nia tuta fabriko en la amasa revolucia kritikado, kia la ekzemplo pri tiuj en la helpa laborgrupo. Plejparto de la laborgrupoj starigis specialajn murgazetojn de amasa kritikado kaj aranĝis antaŭ kaj post deĵorado malgrandajn kritikajn kunsidojn, kaj la fadena disaŭdiga stacio prezentis specialajn programerojn de kritikado — diversaj estis la formoj kaj vivecaj estis la enhavoj. Prave diris iu kamarado laboristo: “Ja necesas, ke la sepcent milionoj da popolanoj ĉiuj partoprenu la kritikadon kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov. Se iuj lin kritikas, dum aliaj ne, do faligo de la ĉina Ĥruŝĉov kaj prevento de kapitalisma restaŭro restas nur babilo. Kie oni ne kritikas lin, do tie kaŝiĝas venena radiko de reviziismo.” La amasa revolucia kritikado multe altigis la klasan

konscion de ni laboristoj kaj fariĝis movforto por antaŭenpuŝi revolucion kaj produktadon.

## AGI STRIKTE LAŬ LA PLEJ NOVAJ INSTRUKCIOJ DE PREZIDANTO MAŬ

**Jan Liven** (reprezentanto de la PLA-a Propaganda Trupo pri la Penso de Maŭ Zedong en la fabriko):

La laboristaro plej bone aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj agas precize laŭ lia instrukcio. Tio ĉi estas la plej profunda impresio, kiun mi ricevis dum pli ol unu jaro post alveno al la fabriko.

En la pasinta jaro, farante barakton antaŭmortan, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon levis diablan venton de kontraŭrevolucia ekonomiismo. Kiam ni venis en la fabrikon, ĝia veneno ankoraŭ ne estis tute eliminata. Do severa provo por la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko estis, ĉu ili povis kiel eble plej rapide elimini ĝian venenan influon kaj pli bone konduki revolucion kaj produkton. Kaj je tiu ŝlosila momento, la Centra Komitato de la Partio publikigis je la 18-a de marto de 1967 la *Leteron al la Revoluciaj Laboristoj, Oficistoj kaj Kadroj de la Fabrikoj, Minejoj kaj Aliaj Entreprenoj de la Tuta Lando*, kiu esprimis la plej grandan prizorgon kaj konfidon de nia amata Prezidanto Maŭ al la laborista klaso. La kamaradoj de la tuta fabriko tuj ekagis, serioze studis kaj klopodis kompreni la esencon de la instrukcio de la Centra Komitato de la Partio, kondamnis kaj forte kritikis la malutilon de la diabla vento de kontraŭrevolucia ekonomiismo, rapide levis novan potencon tajdon de revolucio kaj produkto, plenumis en la mallonga tempo de dek tagoj 40 procentojn de la produkta tasko de la tuta sezono, kaj per tio montris la noblan karakteron de la laboristaro pri senlima amo, senlima fideleco, senlima kredo kaj senlima adoro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

**Jang Ĉunfu** (laboristo):

Publikigo de la letero de la Centra Komitato de la Partio fortege kuraĝigis nin. Ĉiuj kamaradoj-laboristoj en nia laborejo, ĉu maljunaj majstroj aŭ junaj metilernantoj, tiam havis unu saman volon: sturmi por regajni la produktan tempon perditan pro la diabla vento de kontraŭrevolucia ekonomiismo, por ne vanigi la esperon de Prezidanto Maŭ. La maljuna laboristo Li Dehua la unua komencis la batalon per lanĉo de kuraĝa renovigo, dank' al kio oni plenumis en 15 horoj laborkvanton, por kio oni bezonis ordinare 130 horojn.

Eĉ post fino de la deĵora tempo, la laboristoj ne volis forlasi sian postenon, sed daŭrigis sian laboron kun firma decido frakasi la iluzion de la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon per sia agado. En nur dek tagoj, la tuta laborejo jam kreis dek teknikajn renovigojn kaj pluroble plialtigis la laborefikon.

**Ĉen Hingfa:**

Ĉiun plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ la revoluciaj laboristoj kaj kadroj plenumas senescepte kun plej alta entuziasmo, plej granda rapideco kaj plej decidema ago. Ekzemple, en aprilo de la kuranta jaro, la *Popola Ĵurnalo* aperigis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ: **“La granda proletara kultura revolucio estas esence granda politika revolucio de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj sub la kondiĉoj de socialismo, estas daŭrigo de la longdaŭra batalado inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj vastaj revoluciaj popolamasoj en unu flanko, kaj la kuomintanga reakciularo en la alia flanko, estas daŭrigo de la klasa batalo inter la proletaro kaj la burĝaro.”** En la sama tago de ĝia apero, la tuta fabriko jam ĝin studis, diskutis kaj levis altan tajdon de malkovro de la klasbatalo kaj ĝustatempe kunvokis fabrikskalan mitingon por batali kontraŭ la plenmano da klasaj malamikoj. Tio forte stimulis la batalspiriton de la proletaraj revoluciuloj kaj subpremis la arogantecon de la restantaj feĉoj de la kuomintanga reakciularo.

**Vej Juanĝong** (juna laboristo kaj membro de la revolucia komitato de la laborejo):

Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj kadroj de nia fabriko atingis certajn sukcesojn kaj en revolucio kaj en produkto dum la granda kultura revolucio. Kvankam tiuj atingoj estas ankoraŭ tre malsufiĉaj por plenumi la postulon de Prezidanto Maŭ, kaj ankoraŭ longa distanco kuŝas inter ni kaj multaj antaŭirantaj entreprenoj en Ŝanhajo kaj la tuta lando, tamen la Partio donis al ni tre grandan honoron kaj kuraĝigon. En la estonteco, ni nepre nin gardos de fieriĝo kaj faros novajn kontribuojn por la popolo, firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Eĉ se ni gajnis gigantan sukceson en nia laboro, ankaŭ ne estas ia ajn kialo por fieri kaj aroganti.”**

**Ĉen Hingfa:**

Nun ni ĉesigu la kunsidon ĉi tie.

\* \* \*

Ĉiuj stariĝis kaj laŭte kantis *Marnavigo Dependas de la Stiristo*.



# La Naŭa Laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno

**L**A Ŝanhaja Haveno ĉe Huangpu-rivero en orienta Ĉinio estas internacia haveno, kie interligiĝas akvaj kaj teraj transportaj linioj, kaj ĝi estas haveno de amikeco por la revoluciaj popoloj ankaŭ de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj de interhelpo per interŝanĝo de diversaj bezonaĵoj.

Antaŭnelonge, ni vizitis la naŭan laborsekcion por ŝarĝ- kaj malŝarĝ-ado de tiu haveno. Same kiel ĉe la aliaj sekcioj de la haveno, ankaŭ tie senprecedence disvastiĝis la penso de Maŭ Zedong inter la dokistoj sub la gvido kaj stimulado de la ruĝa regpotenco la Revolucia Komitato, kaj la spirita fizionomio de la dokistoj neniam antaŭe estis tiel plena de viveco kaj arda entuziasmo kiel hodiaŭ.


## KAJO POR SUBTENI LA MONDAN REVOLUCION

Ĉie ĉi tie vidiĝas kortuŝaj scenoj de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto tiel en

noktoj kiel en tagoj. Ĉe la bordo de Huangpu-rivero flirtas ruĝaj flagoj, ŝipegoj ankras unu apud alia en longa vico, la gigantaj arganoj sur la kajo kaj la vinĉleviloj sur la ŝipoj senĉese svingadas siajn dekojn da futoj longajn brakojn en- kaj el-ŝipigante diversajn varojn por eksporto kaj importo. Sur la ebenaj vartenejoj kaj en la vastaj helaj staploj abundas diversaj varoj kaj sonas simfonio el la motorbruo de la ŝarĝaŭtoj kaj la kantoj kaj ridoj de la laboristoj... Ni vidis ĉi tie la ĝisĉiele altan entuziasmon de la dokistoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj ankaŭ la novajn atingojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando.

La ŝanhajaj dokistoj havas gloran revolucionan tradicion. Kun arda sento de senlima fidelo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj senlima fidelo al lia proletara revolucia linio ili diris: "Staranto sur la bordo de Huangpu-rivero, ni dokistoj zorgas pri la tuta mondo. Ni certe subtenos la

*Angulo de la Naŭa Laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno.*





*Dokistoj ŝarĝadas ŝipon per materialo por helpi revoluciajn popolojn en la mondo.*

batalojn de la revoluciaj popoloj de la mondo per nia praktika aktivado de rapida en- kaj el-ŝipigo de la importaj kaj eksportaj varoj.” Post depreno de regpotenco en la ŝtormo de Januara Revolucio en 1967, ili bonege plenumis la tutjaran taskon de ŝarĝ- kaj malŝarĝ-ado de tiu jaro, kaj starigis novan rekordon de en- kaj el-portkvanto de varoj en tiu sekcio.

En septembro de 1967, la greka varŝipo Alcyonis sur sia vojo al Cejlono ankris ĉe la kajo de la 9-a laborsekcio. Informiĝinte, ke oni devas ŝarĝi la ŝipon per 9,400 tunoj da rizo, la proletaraj revoluciuuloj kaj la vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de tiu sekcio diris entuziasme: “Ni nepre fruigu la enŝipigon kaj finplenumu la taskon en iom pli ol 30 horoj por montri la forton de la ĉina laboristaro hardita en la granda proletara kultura revolucio.” Kiam tiuj vortoj venis en la orelojn de la fremdlanda kapitano, tiu skuis la kapon nekredeme, ĉar en la jaro 1961, kiam lia ŝipo ankris ĉe la kajo, oni bezonis kvar tutajn tagnoktojn por elŝipigi 10,000 tunojn da kemisterko. Li opiniis, ke neimageble estas plenumi la taskon de enŝipigo de 9,400 tunoj da rizo en nur tridek kaj kelkaj horoj.

La granda proletara kultura revolucio estas potenca movforto por antaŭenpuŝi la disvolviĝon de produkto. Por plenumi la enŝipigan taskon antaŭ la fiksita tempo, ĉe la 9-a laborsekcio aperis kortuŝa sceno de laborado. Tiel la ŝarĝ-

istoj kaj ŝoforoj sur la fronto kiel la laborantoj en la staploj, laborejoj, manĝejo kaj trinkejoj, ĉiuj sin ĵetis en la batalon de ŝarĝado kun plena energio por unu sama celo. Ankaŭ multaj kadroj venis al la lokoj sur la kajo, kie la laborkondiĉoj estas plej malfacilaj kaj la laboro plej bezonas ilin. Ili faris senmankan aranĝon laŭ la varplaco, la formo de la ŝipo, la stato de la staploj, la pozicio de ankrado, la mekanikaj ekipaĵoj kaj laborfortoj. Ili bone kunlaboris per siaj saĝo kaj fortoj, reformis instrumentojn kaj venke plenumis la ŝarĝan taskon en nur 21 horoj kaj 20 minutoj.

Kiam la varŝipo plenŝarĝita per amikeco de la ĉina popolo forlasis la Ŝanhajan Havenon, la kapitano diris emocie kun starigita polekso: “Tio ĉi estas granda venko de la granda proletara kultura revolucio.”

Printempe de 1968, la naŭa sekcio ricevis honoran taskon ŝarĝi marŝipon de la Vjetnama Demokratia Respubliko. Kun profunda malamo kontraŭ la usona imperiismo kaj arda entuziasmo por subteni la fratan popolon de Vjetnamio, la laboristoj lernis, antaŭ komenco de la laboro, la instruon de Prezidanto Maŭ: “La popoloj, kiuj jam triumfis en sia propra revolucio, devas helpi tiujn, kiuj ankoraŭ batalas por sia liberiĝo. Tio estas nia internaciisma devo.” Ili diris: “Ĉiu plia tuno da ŝarĝita varo signifas iom pli da bato al la usona imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciularoj kaj iom pli da helpo al la vjetnamaj fratoj.” Post interkon-



siliĝo kaj diskutado, ili forte striktigis la interligon de la labororganizoj, plibonigis la labormetodojn kaj multe plialtigis la laborefikon en transporto kaj vinĉlevado. Dum ŝarĝado, agante kiel batalantoj kaj kvalitekzamenistoj, la portistoj ankaŭ zorge kontrolis la pakajojn por garantii, ke tiuj estos sekure transportitaj al Vjetnamio kaj se ili trovis nebone faritan pakajon, ili ĝin ŝanĝis ĝustatempe por ke la ŝarĝado kaj transporto estu faritaj bonkvalite.

La laboristoj diris, ke ili kondukas ĉiun produktan batalon kiel politikan batalon, kaj ĉiu el iliaj venkoj estas venko de la granda penso de Maŭ Zedong.

## **DOKISTOJ EN LA EPOKO DE MAŬ ZEDONG**

La ŝanhajaj dokistoj formis unu el la plej frue naskitaj kolonoj de la ĉina laborista klaso. En la longaj jaroj antaŭ la Liberiĝo, la ŝanhajaj dokistoj plej multe suferis de subpremado kaj ekspluatado. Imperiistoj, feŭdistoj kaj burokrat-kapitalistoj rabis el iliaj laborfruktoj gigantan kvanton da riĉaĵoj, sed neniam ilin traktis kiel homojn. Ilin prizorgas kaj subtenas plej multe nur nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kaj Prezidanton Maŭ plej arde amas la dokistoj.

Pro pluv' kaj roso fortikiĝas la plantaĵoj, kaj ĉio kreskas dank' al bril' de l' suno. Dank' al nutrado per la pluvo, roso kaj sunradioj de la penso de Maŭ Zedong, la dokistoj fariĝis viglanimaj kaj kun alta batalspirito kaj ili faris novajn kontribuojn en la granda proletara kultura revolucio per sia diligenta laboro.

Foje, ekfuriozis frosta vento kaj la temperaturo malaltiĝis ĝis 5 gradoj sub nulo. Tiam la laboristoj de la 51-a ŝarĝgrupo de la 9-a laborsekcio estis en streĉa elŝipigado de varoj el la holdo de fremdlanda ŝipo. Subite iu 20 kilogramojn peza kesto kun aparato ĵetiĝis en la ondojn de Huangpu-rivero pro eksvingo de la ŝtalkingo argana. "Hoj rapidu! Tuj savu la ŝtatan varon!" laŭte kriis la juna grupestro Gu Fujuan, kiu estis manipulant la vinĉon. La ferdeko estis dek metrojn super la akvo kaj la kesto baldaŭ estos glutita de la ondoj. Gu Fujuan ne bone scipovis naĝi, sed li tuj saltis en la riveron senhezite, ekmemorante la instruon de Prezidanto Maŭ.

La frosta akvo tremigis lin tutkorpe kaj la furioza torento minacis lian vivon. Pensante, ke la kriza momento estas provo por li, li naĝis tutforte al la dronanta kesto. Kiam li sukcesis elak-

vigi ĝin li jam tiel rigidigis pro frosto, ke li ne plu povis iri.

La ago de Gu Fujuan profunde kortuŝis la kamaradojn ĉeestantajn, kaj ĉi tiuj konkure demetis siajn vatitajn vestojn por lin varmigi kaj admonadis lin hejmeniri por ripozo. Sed Gu Fujuan persiste rifuzis, dirante: "Ĉi tie estas haveno por subteni la revoluciajn fratojn tra la mondo. La hodiaŭa tasko ankoraŭ ne estas plenumita, kiel mi povus reiri por ripozo?" Tion dirante li rekomencis streĉan laboron firme tenante la manipulan stangon.

La disradiana penso de Maŭ Zedong ne nur elkulturas grandan nombron da junaj revoluciaj sturmantoj, sed ankaŭ samtempe alportas junecon al la maljuna generacio de dokistoj, kiuj multe suferis de mizeroj kaj malfaciloj en la malnova socio. Kaj avo Giang Gjuĉang, kiun ni intervjuis, estas unu el ili.

Nun majstro Hiang estas 55-jara. Ĉar ne tre bona estas lia sanstato, la gvidantoj plurfoje konsilis, ke li emeritiĝu. Sed la sangaj historioj de la dokistoj en la malnova socio ĉiam ekscitas lian klasan senton de senlima amo al la Partio kaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Li pensis: "Mi maljuniĝis kaj ne povas fari pezan laboron, mi tamen povas kolekti utiligeblajn objektojn disĵetitajn sur la kajo kaj tiamaniere iom kontribui al la revolucio!" Kaj fine li transposteniĝis al la tenejo de eluzitaj kaj malnovaj objektoj.

En kiom da noktoj kaj tagoj kaj dum kiom da fojoj de ŝtormo kaj torenta pluvego la veterano laboris sur la kajo tute volonte, nek por laŭdo nek por profito. En la pasintaj kelkaj jaroj, li jam ŝparis por la ŝtato riĉaĵojn kun valoro de 80,000 juanoj. Tio ĉi ja estas grandega cifero! Vidinte la amasojn da forĵetitaj feraĵoj, kaŭĉukaĵoj, ŝnuroj, gantoj kaj papero, kolektitaj de li de sur la kajo, ni sentis koran estimon kaj admiron al la nobla komunisma moralo de la maljuna laboristo armita per la penso de Maŭ Zedong.

## **ĈIAM MEMORI LA FRATAJN LABORULOJN ANKORAŬ NE LIBERIGITAJN EN LA MONDO**

Hodiaŭ, ĉielrenversa ŝanĝo prenas lokon ĉe la 9-a laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. La dokistoj, kiuj estis sklavo en la malnova socio, fariĝis mastroj de la nova Ĉinio. Multe pliboniĝis la laboraj kondiĉoj, 80 procentoj de la ŝarĝaj kaj malŝarĝaj laboroj estas plenumataj mekanike, laborekurigo kaj san-

protektado estas bone garantiataj kaj ankaŭ la materiaj vivkondiĉoj de la dokistoj pliboniĝis.

Ni prenu loĝadon kiel ekzemplon. En la pasinteco, multaj dokistoj aŭ tranoktis surstrate kiel priskribis la popoldiro “La firmamento por tegmento, sur propra dorso korpetendo”, aŭ interprete loĝis en la distrikto de malhelaj kaj haladzaj budaĉoj. Hodiaŭ kun finkonstruo de laboristaj novaj loĝkvartaloj en Ŝanhajo, multaj dokistoj transloĝiĝis en novajn domojn. Tiuj pluretaĝaj konstruaĵoj ne nur estas ekipitaj per instalaĵoj por livero de elektro, akvo kaj gaso kaj por forigo de malpuraĵoj, sed ankaŭ havas en proksimeco infanĝardenon, elementan kaj mezgradan lernejojn, poŝtoŝtacion, kuracejon, librejon, grenbutikon kaj diversajn servejojn, kio multe faciligas la vivon kaj laboron de la laboruloj.

La dokistoj tamen neniam forgesos la suferojn en la malnova socio. En la granda proletara kultura revolucio, foje kaj refoje ili kritikis la teorion de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj lakeoj ke “eksploato estas merito”, per siaj propraj sang- kaj larmplenaj travivaĵoj, kaj per tio ripetfoje edukas la junan generacion kreskantan sub la ruĝa standardo. Ili ofte diris: “Kvankam ni jam liberiĝis, tamen la samlandanoj en Tajvan ankoraŭ vivas en fajro kaj mizero. Ni neniam devas forgesi, ke ankoraŭ estas milionoj kaj milionoj da frataj dokistoj en la mondo, kiuj vivas mizere kiel ni antaŭ la Liberiĝo; ni devas zorgi pri la du trionoj de la monda popolo, kiuj ankoraŭ ne liberiĝis.”

Ĉiufoje kiam maljunaj laboristoj de la 9-a laborsekcio parolis al mi pri la favoro de Prezidanto Maŭ, ili rememoris samtempe siajn mizerojn antaŭ la Liberiĝo. Ni prenu la ekzemplon de kamarado Liu Mingĉun, estro de la 72-a ŝarĝ- kaj malŝarĝ-a grupo.

Liu Mingĉun estas nun 53-jara dokisto, kiu daŭrigas la profesion de sia patro. Antaŭ la Liberiĝo, pro la neeltenebla persekutado de bienulo lia patro Liu Ĵicaj devigite fuĝis de la kamparo al la malnova Ŝanhaja Haveno kaj fariĝis tie dokisto. Sed per tio li nur transsaltis el unu abismo en alian, ĉar same kruelaj kiel la bienuloj, la kapitalistoj klopodis ĉiamaniere suĉi la sangon kaj medolon de niaj laboristaj fratoj. Tiam cirkulis inter la dokistoj popoldiro: “Eĉ brava viro ne povas vivteni tri personojn.” La laboristoj ĉiuj estis portempaj dungitoj, kies laborpagoj estis kalkulataj potage, kaj ili devis doni 80 procentojn de la ricevita mono al la tiranaj laborĉefoj! Do el 10 pagitaj groŝoj ili povis ricevi nur 2. Kiel do Liu Ĵicaj

povis vivteni siajn kvar familianojn? Apenaŭ Liu Mingĉun fariĝis 15-jara, li jam devis iri en la inferon kun la patro. Aŭskultante la rakonton de majstro Liu pri elŝipigo de karbo antaŭ la Liberiĝo, oni pli forte sentis doloron kaj indignon!

Dum elŝipigado de karbo ĉe la kajo en tiu tempo, kiom ajn profunda estis la ŝipo, la laboristoj devis plenigi sian korbon per karbo ŝovelante, ĝin surŝultrigi poste, kaj iri supren laŭ la irtabuloj ŝtupon post ŝtupo, turniĝon post turniĝo. Ascendinte la ferdekon, oni devis trapaŝi altajn irtabulojn inter la ŝipo kaj la “karbmonto”. Kaj inter “karbmontoj” iam ankaŭ estis aranĝitaj irtabuloj. Tiujn tabulojn la laboristoj nomis Tabuloj al la Monto. Tia tabulo estis nur pli ol du futojn larĝa kaj altis je tri etaĝoj. Se nur oni missekvis horukadon kaj faris eraran paŝon dum irado sur ĝi, oni falis de sur la alta tabulo kaj trafis almenaŭ gravan vundon, se bonŝance ne morton. Tial ofte okazis akcidentoj de vundiĝo kaj morto kaj sennombraj frataj laboristoj perdis sian vivon aŭ kripliĝis sub la irtabuloj. Cirkulis inter la laboristoj jena kanto:

*Ho, irtabulo al la Monto!*

*Ni karbon portas trans la ponton.*

*Sukceson pagas kukregalo,*

*Fiaskon punas morta falo.*

Rememorante la senfinajn suferojn de la milionoj kaj milionoj da laborantaj popolanoj en la malnova socio kaj pririgardante la feliĉan vivon hodiaŭan sub la gvido de Prezidanto Maŭ, Liu Mingĉun diris emocie: “Sen Prezidanto Maŭ mi ja ne povus vivi ĝis nun, nek povus esti mia hodiaŭa feliĉa vivo. Nun mia monata salajro estas 90 juaĵoj. Mi havas 8 infanojn, el kiuj unu diplomiĝis el mezlernejo, du el malsupera mezlernejo, du nun lernas en elementa lernejo kaj unu finis sian lernadon en elementa lernejo. Ĉio ĉi ja estas feliĉo donita de Prezidanto Maŭ!” Kaj majstro Liu daŭrigis post paŭzo: “Nun la ŝtato pretigis por ni tiel bonajn kondiĉojn, do ni devas firme teni en la koro la pezajn taskojn de la ĉina kaj la monda revolucio sur la ŝultroj de ni laboristoj, kaj ni neniam devas forgesi, ke du trionoj de la laborantaj popolanoj en la mondo ankoraŭ ne estas liberigitaj!”

Simile al la torento en la ondanta Huangpu-rivero, la viglaj scenoj de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto de la amasoj en la 9-a sekcio de la Ŝanhaja Haveno kaj la alta batalspirito de la dokistoj ĉiam pensantaj pri la patrolando kaj zorgantaj pri la tuta mondo impresas neforgeseble.



# Nova

# Provo



*Jang Fuĝen (la tria de maldekstre) prezentas sian labormetodon al junaj teksistinoj.*

**M**I estas ordinara laboristino elkulturita de Prezidanto Maŭ. Dum la senprecedenca granda proletara kultura revolucio de nia lando, mi spertis provon en la batalo inter la du linioj. Kaj en la revolucio mi ricevis ekstreme profundan lecionon de klasa eduko.

En januaro de 1967, mi revenis al Pekino kune kun la Ĉina Virina Delegacio post vizito de fremdlando. Apenaŭ descendinte de la aeroplano, mi tuj aŭdis la ĝojigan novaĵon ke en Ŝanhajo leviĝis ŝtormo de Januara Revolucio. Mi fojrefoje legis en ĵurnalo la *Mesaĝon al la Tuta Ŝanhaja Urbanaro* kaj la *Urĝan Anoncon* de la proletara revoluciularo de Ŝanhajo. La venko de la januara revolucio senkompare ĝojigis min kaj mia koro ekscitiĝis dum longa tempo.

En la vintro de 1966, trompote de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la partia komitato de Ŝanhajo, mi faris eraron praktiki la burĝaran reakcian linion, starante en antagonismo kontraŭ la vasta amaso de junaj ruĝgardianoj kaj revoluciaj ribeluloj. Ĉiufoje, kiam mi ekpensis pri tio, mi ege ĉagreniĝis. Poste, kiam la revoluciaj kamaradoj

helpis min kompreni tiun eraron, mi sentis honton kaj samtempe iom da miskulpigiteco.

Post hejmenreveno en la vespero, turniĝadante en la lito, mi ne povis endormiĝi. Trezoraj libroj de nia amata Prezidanto Maŭ malligis la nodon en mia koro. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La erarojn de la pasinteco oni nepre devas malkaŝi sen indulgo al ies ajn sentemo; kaj estas necese analizi kaj kritiki la pasintajn malbonaĵojn kun scienca sinteno, por ke oni faru laboron en la estonteco pli zorgeme kaj pli bone.”** **“Estas malfacile por iu ajn partio aŭ persono eviti erarojn, sed ni devas erari kiel eble plej malmulte. Kiam eraro estas farita, ni devas ĝin korekti, ju pli rapide kaj ĝisfunde, des pli bone.”** La vortoj de Prezidanto Maŭ ĉiuj estas vero kaj ĉiuj trafis min en la koro. Jes, la revoluciaj kamaradoj kritikis min ja pro zorgemo kaj amo al mi. Tio, kion ili kritikis, estas la de mi praktikita burĝara reakcia linio. Ili tion faris por ke mi kiel eble plej rapide revenu al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Mi faris decidon en mi: Prezidanto Maŭ subtenas la revolu-

ciajn ribelulojn, mi do firme staros ĉe ili, kaj batalos kune kun ili.

Mi estas ŝpinteksistino ekde knabina aĝo. Estas la Partio kiu kreskigis min en gloran komuniston. Mi havas senliman amon al la nova Ĉinio, al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj al la Komunista Partio de Ĉinio. La edukado de la Partio kaj Prezidanto Maŭ starigis en mi la ideon teksti por revolucio. Dum multaj jaroj, mi ĉiam strebis al la celo bone plenumi la produktan laboron por krei pli multan riĉaĵon por la ŝtato. Poste oni elektis min kiel avangardan laboranton de la tuta lando, kaj mi plurfoje vizitis fremdlandojn kiel membro de ĉina delegacio. Kaj tiam mi des pli akre sentis, ke mi devas pli multe kontribui por la konstruado de socialismo. Sed mi neniam pensis, ke sub la kondiĉoj de la proletara diktaturo ankoraŭ ekzistas en la Partio akra batalo inter la du linioj kaj la enpartia plenmano da klasaj malamikoj estrata de la ĉina Ĥruŝĉov kiuj oponas la ruĝan flagon flirtigante "ruĝan flagon". Antaŭe mi ofte pensis: La ŝtatajn aferojn prizorgas nia amata Prezidanto Maŭ, kaj la gravajn aferojn en la fabriko prirespondekas la sekretario de la partia komitato kaj la fabrikestro, mi do bezonas neniom maltrankviliĝi. Dank' al la senprecedenca granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ, estis malkaŝitaj la ĉina Ĥruŝĉov kaj lia plenmano da grandaj kaj malgrandaj agentoj. La fakto edukis min kaj altigis mian revolucion singardemon kaj konscion pri batalo inter la du linioj. Alie, mi ja ne sciis en kio mi faris eraron kaj ne sciis la kaŭzon, eĉ se kapo estus dehakita. El la farita eraro mi ricevis profundan lecionon: Por esti bona laboristo de Prezidanto Maŭ, estas ne sufiĉe nur bone labori sed pligravas gravuri por ĉiam en la koron la instruon de Prezidanto Maŭ "**nepre ne forgesi la klasbatalon**". En revolucio, oni devas kapti antaŭ ĉio la klasbatalon, firme teni la batalon inter la du linioj. Alie oni perdus la orienton de politiko, kaj socialismo degenerus en kapitalismon nerimarkite.

Kiam mi certgrade komprenis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, mia antaŭa antagonisma sento kontraŭ la junaj ruĝgvardianoj kaj revoluciaj ribeluloj iom post iom eliminiĝis. Plena de la klasa sentimento de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, mi decideme stariĝis ĉe la flanko de la revoluciaj ribeluloj kaj batalis ŝultron ĉe ŝultro kun ili. Kiam mi klare distingis la reakcian fizionomion de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova partia komitato

de Ŝanhajo, mi plenenergie malkaŝis kaj kritikis iliajn damnindajn krimojn pri freneza opono kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj forta subpremado al la revoluciaj amasoj. Dum unu monato, mi trifoje skribis dazibaŭojn kun ĉirkaŭ dekmil ideografaĵoj por malkaŝi ilin. Kaj por ĝisfunde elimini iliajn krimojn kaj venenojn, mi plurfoje partoprenis mitingojn por batali kontraŭ ili, kaj kondukis batalon kontraŭ ili vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe. En la ŝtormoj kaj ondegoj de la granda kultura revolucio mi profunde komprenis ankaŭ: Por esti fidela al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, oni nepre devas esti fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, strikte observi la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ, kaj en ĉiaj situacio, paroli kaj agi ĉiam firme starante sur la starpunkto de partiece kaj partiaj politikoj. Kaj la du grandaj revoluciaj organizoj en la fabriko foje konfliktiĝis, mi faris decidon ne partopreni aktivadojn de la burĝara kaj etburĝara frakciismo laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ, kaj fojfoje propagandis lian instruon "**Interne de la laborista klaso ne ekzistas konflikto de fundamentaj interesoj. Kaj interne de la laborista klaso sub la diktaturo de la proletaro ja estas des pli nepravigeble ke oni splitiĝu en du grandajn organizojn kiuj ne povas kunekzisti.**", kaj klopodis akceli la unuiĝon de la du grandaj revoluciaj amasaj organizoj sur la bazo de la penso de Maŭ Zedong. Kiam mi malkovris la kriman intrigon de la klasa malamiko subfosi la "**tenon de revolucio kaj stimulon de produkto**", mi unuiĝis kun amasoj kaj faris firman batalon kontraŭ ĝi. Foje en urĝa kunsido de grupaj aktivuloj, mi diris al aliaj: "Imperiismo kaj moderna reviziismo ja ĉiutage kalumnias nin ke nia granda kultura revolucio malaltigis produktadon; ni ĝuste devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, plenforte teni revolucion kaj stimuli produkton, firme persisti ĉe la produkta posteno por ne vanigi la esperon de Prezidanto Maŭ." Post la kunsido, ni tuj revenis al la laborposteno, kaj bone kondukis produkton kune kun la vasta revolucia amaso de laboristaj gefratoj. Tiel, per la faktoj de kontinua antaŭensalto en la produkto ni donis frapon al imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj!

1968 estas la jaro en kiu nia granda proletara kultura revolucio gajnos kompletan venkon. Mi decidis, dum la nova batalado, je neniuj paŝoj devii de la instruo de Prezidanto Maŭ, ĉiam kaj ĉie remuldi mian ideologion kaj direkti mian aktivadon per la penso de Maŭ Zedong kaj ĉiam resti proletara revolucia batalantino brave defendanta la revolucion linion de Prezidanto Maŭ!



# Vivu la Revolucia Spirito de Ginggang-montaro



*Kamarado Zoŭ Venkaj*

**G**INGGANG-montaro estas la unua revolucia bazloko en la kamparo de Ĉinio, persone starigita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en 1927. La revolucia vojo tie malfermita de Prezidanto Maŭ por sieĝi urbojn per kamparo kaj depreni la regpotencon per armita forto estas la triumfa vojo de la revolucio de la ĉina popolo.

Nun la popolo de nia lando kaj la revoluciaj popoloj de la mondo treege sopiras al Ginggang-montaro. Ili rigardas ĝin kiel la esperon de revolucio, standardon de batalo kaj brilan ekzemplon. Ĉiam pli kaj pli multe da revoluciuloj faras viziton al Ginggang-montaro malgraŭ longa distanco kaj prenas ĝin kiel sian klasĉambbron por studi la penson de Maŭ Zedong.

Ni, la popolo de Ginggang-montaro, senfine fidelas al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al lia revolucia linio. Ni rigardas la propagandon de la penso de Maŭ Zedong al enlandaj kaj eksterlandaj vizitantoj kiel nian ekstreme gloran kaj noblan devon. En 1960 mi laboris kiel klarigisto en la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ ĉe Daging. Mi opinias, ke konatigi al vizitantoj la revolucionan batalon de Prezidanto Maŭ ĉe Ginggang-montaro estas por restigi en iliaj kapoj la grandan figuron de Prezidanto Maŭ kaj levi en iliaj koroj la ruĝan sunon neniam subiron-tan.

En 1927 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ supreniris Ginggang-montaron, kaj la ruĝa suno

lumigis la tutan regionon de la montaro. Mi kaj la aliaj popoloj de Ginggang-montaro sekvis Prezidanton Maŭ por fari revolucion. Ekde tiam la grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ ĉiam kuraĝigas min marŝi antaŭen, kaj lia brila penso ĉiam nutras min por mia kreskado.

En januaro de 1929 Prezidanto Maŭ malsupreniris de la montaro por starigi novajn bazlokojn. Sed, pro la ŝanceliĝo kaj forkuro de Peng Dehuaj, kiu tiam restis ĉe Ginggang-montaro, mallumo denove regis la montaron. La kuomintangaj reakciuloj praktikis la politikon de “haki ĉiujn ŝtonojn, bruligi ĉiujn herbojn kaj buĉi ĉiujn homojn”, kaj Ginggang-montaro dronis en sango. Sed la sabro de la reakciuloj ne povis timigi la heroan popolon de tiu ĉi montaro, nek ŝanĝi ĝian ruĝan koron senfine fidelan al Prezidanto Maŭ. Kiu fidelas al Prezidanto Maŭ, pli valoras ol Taj-monto, eĉ se li vivos nur por unu tago. Kiu ne fidelas al Prezidanto Maŭ, postlasos nur fifamon, eĉ se li vivos por cent jaroj. Tio estas spertaĵo, kiun ni, la popoloj de Ginggang-montaro, akiris dum kelkdek jaroj.

Kiel la aliaj popoloj de Ginggang-montaro mi travivis dudek suferplenajn jarojn nur helpe de mia senfina fideleco al Prezidanto Maŭ, kaj fine venis la liberiĝo en 1949. Post la Liberiĝo ni kondukas revolucion kaj okupiĝas pri produktado denove sub la gvido de Prezidanto Maŭ, marŝante de venko al venko.

En 1965 Prezidanto Maŭ venis al Gingga-montaro. Ree vidinte lin, mi ekscitiĝis eksterordinare. La akcepto fare de Prezidanto Maŭ estas la plej granda kuraĝigo kaj plej granda instigo por mi, kaj tio estas granda movforto, kiu antaŭenpuŝas min pli bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj posedi la penson de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Ĉiu komunisto devas kompreni tiun ĉi veron: ‘El la pafilo venas ŝtatpotenco’.**” Tiuj grandaj, ore brilantaj vortoj **“El la pafilo venas ŝtatpotenco”** lumigis mian koron. Mi rememoras, ke antaŭ kvardek jaroj, tuj kiam Prezidanto Maŭ venis al Daging, li iris inter la amasojn, vizitis la multesuferajn malriĉulojn, mobilizis la amasojn kaj armis ilin. Aktive respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ la amasoj de la kvin vilaĝoj (nome: Daging, Hiaŭging, Ĝongging, Ŝangging kaj Hiaging) starigis en tre mallonga tempo ruĝajn gvardiojn kaj ribelajn taĉmentojn, la virinoj organizis vestlavajn, medicinhelpajn kaj propagandajn grupojn, kaj la geknaboj organizis knabajn grupojn kaj gardstaris ĉe enirejo kaj fino de la vilaĝo kun lancoj en siaj manoj. Kiam batalo okazis, la armeo kaj la popolo kunagis montrante grandegan forton. Tiam vere efektivigis la granda penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito, kaj ĉiu popolano fariĝis soldato. Sen pafiloj estis nek la triumfo de la revolucio, nek la liberiĝo de la malriĉuloj. Sen pafiloj estis neeblaj la depreno de ŝtatpotenco kaj ĝia firmigo. Post la Liberiĝo mi transskribis en regula formo la vortojn de Prezidanto Maŭ **“El la pafilo venas ŝtatpotenco”** sur papero kaj gluis ĝin sub la portreto de Prezidanto Maŭ en la meza ĉambro de mia domo. Mi ankaŭ faris ruĝe lakitan tabuleton kun tiuj vortoj kaj ĉiam portas ĝin kun mi. Mi ofte uzas ĝin por eduki la milicon kaj amason de Daging por ke ili ĉiam memoru la brilan veron **“El la pafilo venas ŝtatpotenco”**.

En 1960 mi ĉeestis la tutlandan kongreson de reprezentantoj de la milico, kaj la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de KPĈ donacis al mi duonaŭtomatan fusilon. Mi pensis, ke tio estas fusilo al mi donita de Prezidanto Maŭ. Mi devas ĉiam memori la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj neniam forlasos la fusilon en mia mano por defendi nian socialisman regpotencon. Mi transdonos tiun ĉi fusilon de generacio al generacio ĝis kiam la imperiismo sur la terglobo estos entute ekstermita, kaj la komunismo komplete realiĝos tra la tuta mondo.

Mi ofte dorsportis tiun ĉi fusilon kaj kondukis eksterlandajn gastojn al la gardstarejoj ĉe Huangjangle kaj Bamianŝan por klarigi al ili la penson de Prezidanto Maŭ pri la popola milito. Mi levis la fusilon donitan de Prezidanto Maŭ kaj diris al ili, ke Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita.”** La ĉina popolo kreis la novan ruĝan Ĉinion per pafiloj sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Ni kredas, ke la popoloj de la mondo nepre kreas la novan ruĝan mondon per pafiloj.

Mi ne nur postulas de mi mem bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj agi laŭ la penso de Maŭ Zedong, sed ankaŭ devas eduki la ĉirkaŭajn amasojn kaj la junan generacion per la penso de Maŭ Zedong por ke la penso de Maŭ Zedong estu ĉiam heredata de generacio al generacio kaj nia lando neniam ŝanĝu sian koloron.

Kun la sukcesa disvolviĝo de la granda proletara kultura revolucio de nia lando la movado de la ruĝa gvardio leviĝis tra la tuta lando en 1966, kaj grupo post grupo da ruĝaj gvardianoj senĉese vizitis Gingga-montaron. Ĉiutage 17,000-18,000 personoj estis akceptitaj ĉe Daging. Mia klarigado al ili ofte daŭris pli ol dek horojn! potage. Krome mi devis kuir akvon kaj aranĝi loĝejojn por ili, tiel ke mi ofte ne povis manĝi nek dormi. Malgraŭ la plen-okupiteco kaj laciĝo mi sentis grandegan ĝojon en mia koro. La ruĝaj gvardianoj subtenataj de Prezidanto Maŭ estas daŭrigantoj de la afero de la proletara revolucio. Bone akcepti ilin kaj propagandi al ili la penson de Maŭ Zedong estas mia glora devo.

Kun senfina amo kaj senfina respekto al Prezidanto Maŭ la revoluciaj batalantoj de diversaj landoj vizitis Gingga-montaron. Ili rigardis la bazlokcon Gingga-montaro starigitan de Prezidanto Maŭ kiel komunan riĉaĵon de la monda proletaro kaj grandan lernejon por studi la penson de Maŭ Zedong. El la granda revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ ili trovis la direkton de sia batalo, plifortigis sian kredon en batalo, plifirmigis sian batalvolon kaj ellernis la taktikon de batalo. Ili eksterordinare amis ĉiun tablcon, ĉiun seĝon, ĉiun lampon kaj ĉiun ŝton-inkujon en la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ kaj havis eksterordinaran respekton antaŭ ĉiu herbo, ĉiu arbo, ĉiu terpeco kaj ĉiu ŝtono sur Gingga-montaro. Ili ofte legis kelkajn paragrafojn el verko de Prezidanto Maŭ sidante sur la ŝtono, kie Prezidanto Maŭ iam sidis por studado. Aŭ ili skribis kelkajn liniojn pri la komprenaĵoj en la studo de verkoj de Prezidanto



Maŭ kliniĝante super la tablo, ĉe kiu Prezidanto Maŭ iam laboris tagnokte. Tion ili rigardis kiel la plej altan honoron kaj la plej grandan feliĉon. Ili ofte petis de mi kelkajn semojn de cedro aŭ kukurbo por ke la semoj de revolucio de Gingga-montaro enradikiĝu, burĝonu, floru kaj donu fruktojn en iliaj landoj. Aŭ ili forportis saketon da tero el la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ sur Gingga-montaro por pavimi sian vojon de revolucio.

En la antaŭlasta jaro, finaŭskultinte mian rakonton pri la revolucia batalo de Prezidanto Maŭ ĉe Gingga-montaro, kelkaj latinamerikaj amikoj ekscitiĝis ĝis larmoj. Ili forte ĉirkaŭbrakis min kaj fojon post fojo laŭte kriis: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” Ili diris al mi, ke en la pasintaj dekelkaj jaroj ili serĉis la vojon por la kompleta sukcesigo de la revolucio en iliaj landoj. Ili vere trovis ĝin, nur kiam ili venis al Gingga-montaro. Ili plue diris, ke Prezidanto Maŭ estas la instruanto de la revoluciaj popoloj de la mondo. Kiam ili estos reirintaj, ili certe agos laŭ la penso de Maŭ Zedong kaj starigos sian propran “Ginggang-montaron” en siaj landoj por ke iliaj patrioj estu liberigitaj pli frue.

Mi treege emociiĝis, kiam mi aŭdis tiujn ekscitajn vortojn de la eksterlandaj amikoj. Kiom multe la revoluciaj popoloj de la mondo amas Prezidanton Maŭ, kaj kiom multe ili bezonas la penson de Maŭ Zedong!

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “**La popoloj, kiuj jam triumfis en sia propra revolucio, devas helpi tiujn, kiuj ankoraŭ batalas por sia liberiĝo.**” Mi pensas, ke propagandi al eksterlandaj amikoj la penson de Maŭ Zedong kaj la vojon de Gingga-montaro estas la plej bona helpo kaj la plej akra revolucia batalilo donataj al la revoluciaj popoloj de la mondo. De nun mi nepre studos la penson de Maŭ Zedong kun dev-konscio pri la kompleta triumfo de la monda revolucio. Mi nepre propagandos la penson de Maŭ Zedong kun profunda amo al la diverslandaj revoluciaj batalamikoj, por ke la revolucia fajrero de Gingga-montaro fariĝu stepa fajrego, kiu brulos tra la tuta mondo.

---

*\*La verkinto de tiu ĉi artikolo estas membro de la Revolucia Komitato de la Gingga-montara Subprovinco kaj antaŭe estro de la ribela taĉmento de Daging.*

## Laŭdoj pri la “Tri Popularaj Artikoloj”

La “tri popularaj artikoloj” estas verkoj pri kolektivismo, verkoj servantaj kiel komandanto kaj orientilo, kaj estas la fundamento de komunisma mondkoncepto por la revoluciuloj.

La “tri popularaj artikoloj” estas maksimumoj, kiujn ni devas plej bone memori kaj plej lerte apliki; ni devas dum la tuta vivo studadi la “tri

popularajn artikolojn” kaj faradi revolucion.

La “tri popularaj artikoloj” estas klara spegulo por vidi nian animon, metro por mezuri niajn vortojn kaj agojn, akra glavo por batali kontraŭ egoismo kaj faciltranĉa lanceto por kritiki reviziismon.

La “tri popularaj artikoloj” donas modelon de la progresinta penso de la proletaro, kaj la vojo montrata de ili estas nia nepre irota vojo por fariĝi komunismaj batalantoj.

---

*La tri artikoloj de Prezidanto Maŭ Servu al la Popolo, Memore al Norman Bethune kaj Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo estas maksimumoj por ĉiu revoluciulo. Ili estas nomataj la “tri popularaj artikoloj”. Tiujn tri brilajn artikolojn ni aperigis en n-roj 3,4 kaj 5 de nia gazeto de 1967.*

# Okazintaĵoj en la Ginan-a Dizel-lokomotiva Fabriko

**L**A granda proletara kultura revolucio de nia lando akcelas la revoluciigon de la homa penso kaj pli firme starigis en la laboranta popolo de nia lando la novan moron rigardi penemon kaj senluksecon kiel honorindan virton, kaj luksemon, malŝparemon kaj pompamon kiel hontindaĵon. Jen kelkaj okazintaĵoj en la Ginan-a Dizel-lokomotiva Fabriko en Ŝandong.

## “BAMBUA PIPO” NE DEVAS ESTI FORĴETITA

Li Minghua, kadro de la produkta sekcio de tiu fabriko, estas filo de malriĉkampano. Li longtempe vivis kaj laboris inter veteranaj laboristoj kun modesta kaj senluksa stilo. Precipe depost la komenciĝo de la kultura revolucio, li konstante studis kune kun ili gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la granda kultura revolucio kaj intense batalis kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la Partio de tiu fabriko. Multaj veteranaj laboristoj diris: “Vi estas konfidinda, Minghua, ke vi tiel agas.”

Li Minghua poste estis elektita kiel interkontakta reprezentanto de la produkta sekcio. Tiam li pensis en si ke li estas “malnova ribelulo” en la kultura revolucio, nun jam respondecas pri gvida laboro, kaj do devas havi “dignan manieron”. Tiel, li forĵetis sian plurjare uzatan bambuan pipon kaj komencis fumi cigaredojn.

Tio fariĝis paroltemo inter multaj laboristoj kaj oficistoj. Kaj la veteranaj laboristoj ekrlatis kun li ne tiel intime kiel antaŭe. Tio tre ĉagrenis lin.

Iun vesperon, Li Minghua vizitis majstron Vang por interŝanĝi pensojn. Tiu sincere diris al li montrante la cigaredon: “Minghua, antaŭe vi fumis per bambua pipo, sed nun vi fumas cigaredon. Ĉu tio ne montras vian ŝanĝigon?!” Iom paŭzinte li daŭrigis: “Mi konas ĝisfunde vian familion, Minghua, en la malnova socio ni ĉiuj vivis duon-malsate. Nur post kiam Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio gvidis nin leviĝi el sub jugo, ni ekhavis la hodiaŭan feliĉan vivon. Ĉiuokaze ni ne devas forgesi la pasintecon! Ĉu vi ne opinias la bambuan pipon ne plu konvena al vi, post kiam vi leviĝis al la pozicio de ‘estrulo’?” Ĉiu vorto de majstro Vang trafis lian penson, lia cerbo tuj klariĝis, kvazaŭ li vekigis el sonĝo. Li ekkonis ke la forĵeto de la bambua pipo ne estas bagatelo, sed speguliĝo de la burĝara mondkoncepto en la kapo. Forĵeti la bambuan pipon signifas forĵeti tradicion de penemo kaj senlukseco. La senĉesa leviĝo de komforteco en la vivo signifas senĉesan regreson en la ideologio. Konsciante tion, li firme ekpemis la manon de majstro Vang kun varmaj larmoj kaj diris emociite: “Majstro Vang . . . Mi dankas vin pro via sincera helpo. De nun mi nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam konservos la naturon de penemo, diligentemo kaj ŝparemo, kiun posedas la laboristaro.

## UNU DRAPA PANTALONO

Lju Deĉuan de la laborejo por riparado estis elektita kiel konstanta komitatano de la revolucia komitato de la fabriko. Kiel tia li ofte devis ĉeesti kunvenojn en kon-



cernaj provincaj kaj urbaj institucioj. Tiam li sentis, ke lia pantalonon el kruda ŝtofo kun flikaĵoj aspektas tre malkonvena, kaj ĉiam deziris havi drapan pantalonon. Li do aĉetis tian por si.

Iun tagon li kun bona humoro iris al sia laborejo, sed ekster lia atendo la laboristoj ekbabilis pri li. Majstro Vang diris: "Ho malgranda Lju, vi ja ne estas simplulo. Nur malmultajn tagojn post enoficiĝo, vi jam aspektas tute moŝte!" Kaj almetis majstro Li: "Kiel gvidanto oni ja devas havi la manieron de gvidanto..." Malgranda Lju ne konis la kialon. Sed kiam li mallevis sian kapon kaj vidis la novan pantalonon, li tuj ekkomprenis ĉion, kaj sentis bruliĝon sur la vangoj. Tre embarasite, li klopodis mildigi la situacion: "Majstro Vang, mi aĉetis tiun novan pantalonon, ĉar mankas al mi malnovaj..." Vang ek-hahais kaj frapetis la ŝultron de malgranda Lju, dirante: "Junulo, gardu vian penson de forflankiĝo..."

Nokte, dum enlitiĝo, vidante la novan pantalonon, malgranda Lju rememoris la okazaĵon en la tago. Ĉu la kaŭzo vere estis nesufiĉo de pantalonoj? Ne. Nur pro tio ke multaj malbonaj pensoj subagitis. Tiam li ekmemoris la vortojn de Prezidanto Maŭ: "Oni devas rigardi kaj analizi ĉion el vidpunktoj de klaso kaj klasa batalo kaj per metodo de klasa analizo." "Mi strebas," Lju pensis, "nur al ekstera imponeco, sed neglektas la ideologian reformon." Ju pli malgranda Lju pensis des pli li emociiĝis. Li ekrememoris la malnovan socion. La avo ĉie almozpetis, la gepatroj trapasigis suferplenajn jarojn sub la skurĝoj de kapitalistoj. Tiam, al lia familio mankis manĝoj kaj vestoj, kaj ĉiuj liaj familianoj vivis kiel brutoj... Sed hodiaŭ mi tute forgesis ĉion ĉi tion. Pensante ĝis tie malgranda Lju eklarmis kun ĉagreno. Li iris antaŭ la portreton de Prezidanto Maŭ, rigardis la afablan vizaĝon de la amata Prezidanto kaj penteme diris: "Ho Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ! Mi nepre ne forgesos la pasintan mizeron de la klaso, ĉiam aŭskultos viajn vortojn kaj fariĝos popola servanto neniam perdonta sian ruĝan koloron." Je la sekvinta tago li demetis la drapan pantalonon kaj denove surmetis la pantalonon el kruda ŝtofo kun flikaĵoj.

## NE PLU VETURI EN AŬTOMOBILO

Iun tagon, bela aŭtomobilo venis al la pordo de la lokomotiva fabriko, por forveturigi Fan Venŝeng, respondeculon de la konstrua brigado, por ke li faru ie raporton. Tiam multaj junuloj ekkriis: "Malgranda Fan, rapidu, aŭtomobilo venis veturigi vin por fari raporton!" Nereteneble la koro de malgranda Fan ekbatis forte. Li pensis: En aŭtomobilo veturis pasinte nur "grandaj personoj", krudulo kia mi ja ne devas veturi en ĝi. Pensante tion li ne volis enaŭtomobiliĝi. Sed la veninto in-

siste petis lin ekveturi per la aŭtomobilo. Pro la varma invitado li kontraŭvole suriris en la aŭtomobilon.

Ĉar la modelaj faroj de la brigado rapide disfamiĝis en diversaj lokoj. Ĉiam pli multaj invitis malgrandan Fan raporti iliajn spertojn kaj aŭtomobiloj unu post alia venis por veturigi lin. Kun paso de la tempo, li iom post iom kutimiĝis al tio kaj cetere eksentis sin komforta en aŭtomobilo.

Foje, kiam malgranda Fan revenis de iu fabriko post faro de raporto, iu nereformita elemento deveninta de bienula familio iris al li kaj diris flateme: "Malgranda Fan, vi vere ne estas simpla homo, vi tuttage veturas en aŭtomobilo por fari raportojn, nia laborejo multe ŝuldas al via bona gvidado!" Aŭdinte tion malgranda Fan ekmiris: Tiu homo estis tre ruza pasinte, sed hodiaŭ li aspektas tute alie kaj multe flatas al mi. Kion tio signifas?

Vespere, kiam li sidiĝis, la okazintaĵo en la tago klare reaperis en lia kapo. Li cerbumis: de la lasta tempo iuj flatas al mi, sed estas ankaŭ aliaj, kiuj estas malkontentaj pri mi. Antaŭ kelkaj tagoj malgranda Jang, kiu ribelis kune kun mi en la kultura revolucio, diris al mi: "Malgranda Fan, vi ne devas ofte veturi en aŭtomobilo. Gardu viajn ostojn de ekmoligi!" Ankoraŭ iuj diris: "Malgranda Fan ŝanĝiĝis!"

Ĉu oni devas veturi en aŭtomobilo? Li malfermis la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj tuj sonis la senlaca instruo de Prezidanto Maŭ ĉe liaj oreloj: "Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj... por ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienca en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema lukto." Studante la instruon, li sin kontrolis kaj ekmemoris ke antaŭ kelkaj tagoj iu hospitalo invitis lin fari raporton, sed li ĝis nun ankoraŭ ne iris pro manko de aŭtomobilo. Tio ekkonsternis lin. Li ankaŭ rememoris, kiel malagrabla li sentis sin, kiam li unuafoje veturis en aŭtomobilo. Sed hodiaŭ sen aŭtomobilo li eĉ ne volas fari raporton. Kia demando tio estas? Malgranda Fan meditis kaj meditis senĉese. Tiam, li ripetade legis koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, kaj li eksentis, ke li ŝanĝiĝis, komforte ŝanĝiĝis. Tion pensante, malgranda Fan firmvole ekstaris kaj diris en si kun la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la manoj: "Mi firme tenos en la kapo la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj radikale ŝanĝos mian mondkoncepton."

Post kelkaj tagoj, la Ginan-a Elektralampa Fabriko invitis lin fari raporton. Antaŭ la alveno de la aŭtomobilo, malgranda Fan jam biciklis al la fabriko. Kiam li finis la raporton, kaj oni invitis lin manĝi ĉe ili, li diris: "Ne, ni havos kunvenon en nia fabriko por studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Mi ne povos partopreni ĝin, se mi reiros pli malfrue." Kaj li tuj biciklis for.

# Rimedo por Preventi Degeneron de Terpomo Trovita

**D**EGENERO de terpomo dum longe estis nesolvebla problemo por agrokulturo en- kaj ekster-lande. Sed nun nia lando jam trovis rimedon por ĝin preventi. Tio estas rimarkinda atingo de la revoluciaj laboristoj kaj sciencistoj de la Instituto pri Heredeco de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj agronomiaj teknikistoj de diverslokaj produktaj entreprenoj, kiuj en lastaj jaroj iris profunde en la amasojn, lernis de ili, sisteme pristudis kaj resumis la riĉan sperton de niaj kamparanoj en preventado de terpoma degenero, kaj faris eksperimentadon kaj disvastigon en multaj regionoj, laŭ la instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “**praktiko, konado, denova praktiko, denova konado**”.

La terpomo estas altprodukta planto kaj konsumata ne nur kiel ĉefa manĝaĵo, sed ankaŭ kiel legomo dum la sezono, kiam en la merkato malmultas aliaj legomoj. Sed, en generado, ĝi donas ĝenerale riĉan rikolton nur en la unua jaro de enkonduko kaj multe malpli en la dua jaro kaj en la tria jaro ĝi perdas jam la indecon por servi kiel semo. Tiu ĉi fenomeno de degenero estas ĉie renkontata en la terpomproduktaj regionoj de la tuta mondo kaj estis komuna problemo por diverslandaj sciencistoj de pli ol cent jaroj. Kvankam diverslandaj sciencistoj donis klarigojn pri la kaŭzo de degenero de terpomo, tamen neniu el ili sukcesis solvi la problemon en produkta praktiko. De multaj jaroj, en la vasta regiono de centra Ĉinio, oni ne povis disvastigi la kulturan areon de terpomo pro neeblo de uzo de lokaj semoj kaŭze de degenerado.

Post la jaro 1960, sciencistoj de la Instituto pri Heredeco komencis esploradon por solvi tiun ĉi urĝan problemon en la produkto. Unue, ili provis solvi tiun ĉi problemon en nia lando per la materialo trovita en fremdlanda literaturo. Ili koncentris la t. n. “esencojn” de la fremdlandaj literaturoj kaj ripetis eksperimentadon laŭ ili. La rezultoj pruvis, ke la donitaj rimedoj ne povas solvi la problemon en praktika produktado. Poste, ili ripetade studis la verkojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko, Pri Kontraŭdiro kaj Kontraŭ Libroadorado* kaj faris laŭ lia instruo interligi teorion kun praktiko, iri en la amasojn kaj lerni de la amasoj. El sia laboratorio ili iris laŭvice al la vastaj kamparoj de la provincoj Hejlongjiang, Liaŭning, Hebej kaj aŭtonoma regiono Interna Mongolio k. a., humile lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, faris vastan enketadon kaj esploradon pri la degenero de terpomo, kaj kolektis multajn valorajn spertojn pri solvo de tiu problemo. Poste ili faris sisteman resumon kaj

sciencajn eksperimentojn pri la spertoj. Ili kulturis en nia vasta kamparo diversajn speciojn konformajn al malsamaj lokaj kondiĉoj kaj alprenis konvenajn kulturajn metodojn taŭgajn por malsamaj specioj, tiel ke ili fine sukcesis trovi taŭgan rimedon por preventi degeneron de terpomo. Tiu ĉi sukceso estas kristaliĝo de la kolektiva saĝo de la laboranta popolo kaj la sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj nova venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong sur la fronto de scienco kaj tekniko.

## Altprodukta Hibrida Sorĝo

**L**A revoluciaj laboristoj kaj sciencistoj de la Instituto pri Heredeco de la Ĉina Akademio de Sciencoj firme praktikis la grandan politikon de servigo de scienca esplorado al la socialisma konstruado, energie klopodis en strikta kombiniĝo kun terkulturistoj por elkulturi kaj disvastigi altproduktan hibridan sorĝon kaj atingis rimarkindajn rezultojn.

La hibrida sorĝo devenas de hibridigo de vir-sterila sorĝo kun ordinara sorĝo. La hibrida specio posedas tre okulfrapajn superecojn. En lastaj jaroj, tiu specio estis disvastigita en la vastaj regionoj de la provincoj Ŝandong, Ŝanhi kaj Hebej kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La totala plantareo atingis milionojn da muoj. La rezultoj de ĝia kulturado en diversaj lokoj montris, ke la hibrida sorĝo ne nur estas eltenema kontraŭ trosekeco, inundo, alkalo kaj malgraseco de grundo kaj havas tre fortan akomodigemon, sed ankaŭ estas ĝenerale altprodukta en grandarea kulturado, kio estas aparte ĝojinda. En multaj lokoj, oni jam akiris pomuan produktokvanton de pli ol 500 kilogramoj en vastarea kulturado de la hibrida sorĝo. Vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme laŭdas ĝin kiel “rizon en la nordo” kaj “trezoron por alkala kampo”.

Sorĝo estas unu el la ĉefaj grenoj en la vastaj regionoj de nordorienta kaj norda Ĉinio kaj grava materialo por produkti alkoholaĵon, amelon kaj sukeron. En 1958, la jaro de granda antaŭensalto, ĉinaj revoluciaj sciencaj



laborantoj jam komencis kulturadon de hibrida sorgo laŭ la instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propra forto por kuraĝe strebi al prosperiĝo. La senprecedenca granda proletara kultura revolucio forte akcelis la disvastigon de la hibrida sorgo. Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ, la proletaraj revoluciuloj de la Instituto pri Heredeco, kiuj partoprenis la eksperimentadon kaj disvastigon de la hibrida sorgo, iris al diversaj komunumoj kaj produktaj brigadoj por fari enke-

ton kaj esploron, lerni kaj resumi spertojn kaj progresintajn teknikojn de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en kulturado de la hibrida sorgo, propagandi kaj disvastigi tiujn spertojn kaj teknikojn kaj helpi la diverslokajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn elkulturi arojn post aroj da teknikaj kernuloj por ĝia kulturado, kaj per tio faris tre grandan kontribuon al la disvolvo de la terkultura produkto de tiuj lokoj.

## KURANTAJ AFEROJ

### ALTA PRODUKTKVANTO DE SUKERO EN GUANGDONG-PROVINCO

Firme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **“tenu la revolucion kaj stimulu la produkton”**, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la suker-industrio en Guangdong-provinco akiris venkon kaj en revolucio kaj en produkto. La produktkvanto kaj kvalito de sukero dum la produkta sezono de 1967-1968 superis la plej altan nivelon en la historio de Guangdong-provinco. La totala produktkvanto pligrandiĝis je pli ol 17% kompare al tiu en la pasinta sezono.

### ALT-EFIKA DECENTROKURA VIBRANTA AKVO-APARTIGILO

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Lingŝan-a Karblavejo de la Benhi-a Minkespluata Administracio sukcese fabrikis alt-efikan decentrokuran vibrantan akvo-apartigilon kaj tiel levis la teknikon de akvo-apartigilo en karblavado en nia lando al nova nivelo.

La akvo-apartigilo estas grava instalaĵo en karblavejo. La karbo elfosita el minejo devas esti lavita en la karblavejo por malmultigi la enmiksitaĵojn, por ke ĝi fariĝu pura. Poste oni devas senigi ĝin je akvo antaŭ ol ĝin sendi al koakso-preparejo. En la pasinteco la akvo-apartigiloj uzataj en nia lando estis plejparte importitaj el eksterlando aŭ fabrikitaj laŭ la modeloj de importaĵoj. Ili ne nur estas pezaj, okupas grandan spacon kaj konsumas grandegan kvanton da elektro, sed ankaŭ estas de malalta efiko, kaj la restanta akvo en la pura karbo estas konsiderinde multa. Tio malutilas al la preparado de ko-

akso kaj ankaŭ alportas multajn malfacilojn al fervoja transportado.

### ŜARGAŬTO “GINGGANG-MONTARO”

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Gianghi-a Aŭtomobila Fabriko senŝanceliĝe iras la revolucionan vojon de sinapogo sur la propra forto kaj sukcese produktis la unuan grupon da 12 aŭtoj kun la komercmarko “Ginggang-montaro”.

La ŝarĝkapablo de tiuj aŭtoj estas du tunoj kaj duono. La motoro estas facile funkciigebla, kaj la deklivo-surgrimpa kapablo estas alta.

### NOVTIPA LANTONDILO

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Hinin-a Fabriko de Elektraj Instrumentoj kaj la Ŝanhaja Instituto de Elektraj Instrumentoj kune projektis kaj sukcese provfabrikis novtipan lantondilon kaj faris per tio novan kontribuon al la mekanikigo de la brutbreda produktlaboro en nia lando.

La labor-efiko de tiu novtipa elektra lantondilo estas kelkoble pli alta ol tiu de la ordinaraj, kaj la labor-intenseco de ties manipulado estas multe malpli granda. Ĝi jam atingis internacian progresintan nivelon.

Antaŭnelonge tiu fabriko okazigis kunvenon, en kiu oni demonstris la tondilon. La reprezentantoj de pli ol tridek koncernaj unuoj en Kinghaj-provinco rigardis la komparan prov-tondon, kiun oni faris per ĝi kaj sampeca lantondilo produktita eksterlande. Ili unuanime laŭdis la elstarajn bonajn kvalitojn de la novtipa elektra lantondilo.

---

# Firmaj Defendantoj de Phou Khouth

---

En la komenco de 1968, la heroaj patriotaj armeo kaj popolo de Laoso lanĉis grandskalan kaj furiozan atakon kontraŭ la dekstrula armeo de Laoso. Ili ĉie faris atakojn al la malamikoj tiel en la supra Laoso kiel en la malsupra, tiel en la montregionoj kiel sur la ebenejoj, tiel en vilaĝoj kiel en urboj, kaj akiris brilajn venkojn unun post alia. Eksterminte proksimume 3,000 malamikojn en la konkero de Nambak, loko grava laŭ strategia konsidero, je la 14-a de januaro, la patriotaj armeanoj kaj popolanoj marŝis antaŭen profitante la favoran momenton post la venko, furioze surprizatakis la tri malamikajn batalionojn garnizonantajn ĉe Muong Ngan sude de Ĝars-ebenejo je la 3-a de februaro, rapide okupis la ĉefstabejon de la malamiko kaj liberigis per unu atako la tutan regionon de Muong Ngan.

La patriotaj armeo kaj popolo de Laoso nun jam plene tenas en siaj manoj la iniciativon sur la batalejo. Senŝanceliĝe respondante al la alvoko de Neo Lao Haksat kaj princo Souphanouvong disvolvi la spiriton batali brave kaj sinofereme, ili firme decidis antaŭenmarŝi profitante la favoran momenton post la venko por akiri ankoraŭ pli grandan venkon.

La gajno de la venko kaj la iniciativo sur la batalejo fare de la armeo kaj popolo de Laoso manifestis la potencon de popola milito kaj rezultigis el ilia sanga batalado. Antaŭ la komenco de la granda ofensivo de la laosaj armeo kaj popolo, la armeo de la usona lakeo la laosa dekstrularo lanĉis plurajn frenezajn atakojn kontraŭ la monto Phou Khouth, kiu estas la pordo de Ĝars-ebenejo de Siengkvang-provinco, intencante okupi tiun montregionon kaj utiligi ĝin kiel salttabulon por invadi Ĝars-ebenejon. Sed nun la monto Phou Khouth ankoraŭ fiere staras kiel venkinto sur la plejfronto de batalado de la lasoa popolo kontraŭ la usona imperiismo por nacisavo.

La kaŭzo, ke la majesta giganto Phou Khouth povas staradi kiel nevenkebla heroo, kuŝas en tio ke ĝi havas firman defendanton, la Popolan Liberigan Armeon de Laoso. Man kaj la subplotono sub lia komando ja estas brila standardo de la trupo de la Popola Liberiga Armeo gardanta tiun monton.

Ĉi-sube sekvas rakonto pri Man kaj lia heroa subplotono en la defenda batalo je la 14-a de marto, 1966. Amikoj, ni povas vidi en ĝi, ke ĝuste dank' al sia kuraĝo kaj sentimeco al vivofero la armeo kaj popolo de Laoso venkis la malamikon.

—La Red.





*Generalo Sinkapo (la unua de dekstre, en la unua vico), reprezentanto de la Plej Alta Komandejo de la Laosa Popola Liberiga Armeo direktas batalon kune kun komandantoj sur la fronto de Phou Khouth.*

En la 14-a de marto, 1966, la armeo de la usona lakeo la laosa dekstrularo portempe okupis unu el la tri altaĵoj de Phou Khouth, nome la Altaĵon N-ron 3, tute elĉerpinte siajn fortojn. Sed la subplotono de Man ĉiam firme tenadis la tranĉeon ĉe la monttalo de la altaĵo ĝis la posttagmezo de la 19-a. Ili troviĝis malpli ol 50 metrojn for de la pozicio de la malamikoj sur la monto, kaj ilin minacis kvazaŭ akra bajoneto.

Tiam nur 4 homoj restis el la subplotono de Man. Kvintaga intensega batalo kaj la strikta blokado de la malamiko portempe rompita ilian interligon kun la supera instanco. Sed Man kaj liaj tri kunbatalantoj ankoraŭ obstine bataladis en sia tranĉeo sur la Altaĵo N-ro 3. Dum kvin tagnoktoj, ili nenion manĝis kaj trinkis. Ili malgrasiĝis rimarkeble, sed iliaj brilaj okuloj disradiis per firma fido pri la fina venko. En la sesa tago, Man kaj liaj kunbatalantoj finfine sukcesis rilatiĝi denove kun la komandejo de sia bataliono kaj ricevis ĝojigan novaĵon, ke la bataliono lanĉos atakon tiuvespere por repreni la Altaĵon N-ron 3.

Ĉirkaŭ la naŭa horo nokte, unu plotono de la Popola Liberiga Armeo senbrue venis al la tranĉeo de Man irante laŭ la tranĉeo, sub la ŝirmo de la mallumo. Finaŭdinte la raporton de Man, la plotonestro diris al li: “Nun vi jam plenumis vian taskon kaj via subplotono devas tuj retiriĝi al la postfronto por bone ripozi.” La vortoj de la plotonestro sonis por Man kvazaŭ tondrego en serena tago. Li diris maltrankvile: “Plotonestro, ni ne povas ripozi en la nuna momento. Ni volas batali ĝis repreno de la Altaĵo N-ro 3.” Kaj la tri apude starantaj kunbatalantoj de Man diris unuvoĉe: “Ni havas sufiĉe da forto por dek sinsekvaj bataloj.” La bravaj vortoj esprimis la firman decidon de la batalantoj. La plotonestro tre kortuŝiĝis kaj tuj kontentigis ilian elkoran peton.

Je la tria horo en la sekvanta mateno, ekbruis pafoj por repreni la Altaĵon N-ro 3. Kugloj de forta malamo pluvis sur la postenon de la malamikoj, kaj ĉi tiuj surprizvekiĝis kaj tumultigis en





*Kontraŭaerataka trupo de la Laosa Popola Liberiga Armeo postenanta sur Phou Khouth ĉiam estas en vigla gardemo por ekstermi usonajn agresontajn aerbanditojn.*

konfuzo. La subplotono sub la gvido de Man lanĉis surprizatakon al la malamikoj deflanke kaj kuraĝe ensturmis ilian pozicion, forgesante sian malsaton kaj laciĝon. Man la unua saltis en la tranĉeon n-ron 1, kiu estis tuj apud la posteno de la malamiko, kaj furioze mitralis al la malamikoj kaj ĵetis kelkajn mangrenadojn al ili. Profitante la momenton, kiam la malamikoj ne povis levi sian kapon sub la forta atako, Man sin ĵetis al ili per eksalto, mortigis aron da ili kaj okupis parton de ilia fronta tranĉeo. Tiam ankaŭ aliaj batalantoj de la Liberiga Armeo alkuris unuj tuj sekvante aliajn.

Post la perdo de sia fronta tranĉeo, la malamikoj koncentris siajn mitralojn kaj aliajn pafilojn por furioze draŝi la tranĉeon kun la intenco ĝin repreni. Tiam la batalantoj ekaŭdis la ŝtalan

voĉon de subplotonestro Man: "Firme tenu la tranĉeon, pafu intense, ŝtopu la mitralojn de la malamikoj kaj ilin subpremu!" Je tiu momento, alia kolono de la Liberiga Armeo sturmis rekte en la vizaĝon de la malamikoj, furioze batis ilin kune kun Man, kaj la malamikoj retiriĝis iom post iom sub la premo de la sturmantoj kaj fine venis sur la montsupron. Sed ankaŭ la tieaj batalaj konstruaĵoj baldaŭ estis konkeritaj de la Liberiga Armeo. La malamikoj obstine rezistantaj ĉeangule estis plejparte mortigitaj kaj la postrestantaj el ili forfuĝis en paniko. La Liberiga Armeo reprenis la tutan Altaĵon N-ron 3. Dum persekutado de la fuĝantaj malamikoj, Man bedaŭrinde mortis oferinte sian lastan guton da sango al la liberiga afero de la laosa popolo. Eĉ en sia agonio li ankoraŭ senĉese kuraĝigis siajn batalkamaradojn: "Firme tenu Phou Khouth, kaj tiel ni venkos!"



# *Financa Krizo Uraganas tra Okcidenta*

## *Eŭropo kaj Norda Ameriko*

**F**INANCA krizo, la plej granda en la lastaj 40 jaroj, nun forte atakas la kapitalisman mondon kaj skuas la tutan kapitalisman sistemon. Tio markas pluan profundigon de la ĝenerala krizo de kapitalismo en politiko kaj ekonomio, kaj montras ke la putra, dekadencia imperiisma sistemo estas pli rapide iranta al pereco.

La kaŭzo de tiu krizo estas la bankroto de la usona dolaro kiel apogilo de la monsisistemo de la kapitalisma mondo. Rezulte de longdaŭra, furioza praktikado de agresa kaj ekspansia politiko fare de la usona imperiismo tra la tuta mondo, malpleniĝas la fisko de Usono kaj elĉerpiĝas ĝia orrezervo, tiel ke la pozicio de la usona dolaro fariĝas ĉiam pli malforta. Ĝia agresa milito en Vjetnamio longdaŭre kaj grandkvante englutas la limigitajn financajn kaj materiajn rimedojn de Usono, kaj tio plie rapidigas la disfalon de la dolara pozicio. En tia cirkonstancaro, en la merkato de la Okcidento sinsekve eksplodis ĉi-jare tajdo de konkura elvendo de dolaroj kaj sterlingaj funtoj kaj aĉeto de oro. La konkura aĉetado de oro je la fino de februaro kaj komenco de marto aparte similis al nehaltigebla akvego trarompanta digon kaj ĵetis la gravajn centrojn de financa merkato de la Okcidento, Londonon, Parizon, Zurikon k. a. en senprecedencan haoson, kiu sekvigis haoson en la merkatoj de akcioj kaj varoj. Pro la alfrontita katastrofo, la grupoj de monopola kapitalo en la okcidentaj landoj falis en panikon kaj la kapitalista gazetaro ne povis reteni sian lamentadon.

### **LA USONA IMPERIISMO TROVIĜAS EN LA FRONTO SUB LA ATAKO DE LA URAGANO**

En la uragano de tiu intensega krizo, la usona imperiismo estis plej forte atakata en la fronto. La usona monopola kapitalo troviĝis en granda konsterniĝo, kaj la merkato de akcioj kaj varoj en la lando trafis haoson.

En la tempo, kiam en okcidenta Eŭropo furiozis la vento de konkura aĉeto de oro, ĝi forte skuis ankaŭ la merkaton en Usono. Ĉar la usona leĝo malpermesas privatulan posedon de oro, grandaj kapitalistoj de Usono elteris sian monon el la lando por partopreni la konkuron de oraĉetado en la merkato de okcidenta Eŭropo. Aliaj kapitalistoj kaj spekulacistoj amase foruzis siajn dolarojn enlande por konkure aĉeti platenon, arĝenton

k. a. altvalorajn metalojn kaj eĉ orajn kaj arĝentajn ornamaĵojn por eviti perdon okaze de devaluto de la dolaro. Pro tio ke la konkuro de aĉetado de materialoj atingis "ardecon" kaj la pozicio de la dolaro estis tute nestabila, multaj financaj kaj komercaj centroj en la Okcidento ĉesigis unu post alia sian negocadon. La varkomercado en la du grandaj urboj Novjorko kaj Ĉikago ankaŭ foje falis fundamente en paralizan staton.

Vizaĝe al la danĝera situacio de proksimiĝo al kompleta disfalo de la dolaro kaj la financa kaj mona sistemo de la tuta kapitalisma mondo, la reganta kliko de Usono troviĝis en granda konfuziĝo. La Johnson-registaro unue provis kvietigi la publikan maltrankviliĝon per malplenaj deklaroj pri "firma defendo de la pozicio de la dolaro" k. s. En la nokto de la 14-a de marto estis alprenitaj aliaj "urĝaj paŝoj", inkluzive de la fermo de la orborso en Londono, abolo de ora garantio por la dolaro en Usono kaj plialtigo de diskonta procento. Tuj poste, en la 16-a de marto, la reprezentantoj de la monopola kapitalo de ĉefaj kapitalismaj landoj de okcidenta Eŭropo estis invitatitaj al Vaŝingtono por okazigi dutagan urĝan konferencon, en kiu estis farita decido, kiu fakte likvidis la "Ĝeneralan Oran Kason" starigitan por protekti la pozicion de la dolaro kaj lasis la dolaron devaluti en la merkato de la Okcidento.

### **VENTO DE KONKURA AĈETADO EN LA LONDONA BORSO KAJ PLENA KONSTERNIĜO DE LA MONOPOLA KAPITALO**

La centro de la uragano de konkura aĉetado de oro estis la londona borso de oro, kie koncentriĝas la negoco de oro de la kapitalisma mondo. De la fino de februaro kaj la komenco de marto, la vento de konkura aĉetado de oro blovis ĉiam pli furioze de tago al tago. En la 14-a, la komercita kvanto de oro atingis ĉ. 400 tunojn, t. e. kelkdekoble super la ordinara kvanto. La furiozeco kaj la longdaŭreco de la uragano estis ambaŭ senprecedencaj. Sub tia intensega atako, Usono jam ne povis plu konsideri pri la "kredito" de la dolaro kaj petis Brition fermi la borson de oro ekde la 15-a de marto por malebligi privatulojn aĉeti tie oron per dolaroj.

Pro la ŝanceliĝanta pozicio de la sterlingo kaj dolaro kaj neebila akiro de oro por la posedantoj de tiuj du monoj, ili komencis konkure aĉetadi arĝenton, stanon, kaŭĉukon k. a. materialojn, tiel ke abrupte leviĝis la prezoj de tiuj varoj. Timante ĉiam pli furiozan

blovado de la vento de konkura aĉetado de diversaj varoj, levita post la fermo de la borso de oro, Britio simple ordonis fermon de la borsoj ankaŭ de arĝento, stano, kaŭĉuko, kakao, kafo, faruno, ligno, sukero k. a.

En tiu uragano, ĉiam pli intense disvastiĝis la onidiro pri probabla refoja devaluto de la sterlingo. Timante pli grandan ĥaosigon de la financa merkato kaj pli grandan premon falontan sur la sterlingon, la konsternita brita registaro ankaŭ fermis la borson de fremdaj monoj kaj ordonis feriojn al la bankoj, en la sama tempo kun la fermo de la borso de oro.

## FURIOZA LEVIĜO DE ORA PREZO EN PARIZO KAJ LA FRANCAJ AŬTORITATULOJ EN SERĈADO DE KONTRAŬRIMEDOJ

Pli intense batalante pri hegemonio kun Usono, la reganta kliko de Francio ĝojis pri alies malfeliĉo kaj la atakoj ricevitaj de la dolaro kaj ne ŝparis klopodojn por sekrete akceli la uraganon. Sed, aliflanke, ĝi timis ankaŭ la seriozajn sekvojn, kiuj rezultiĝos en la tuta kapitalisma mondo el la disfalo de la dolaro kaj puŝos ankaŭ Francion en la katastrofon.

La uragano de konkura aĉetado de oro en la pariza borso blovis same furioze kiel neniam antaŭe. La komercita kvanto de oro en la 14-a superis la valoron de pli ol 260,000,000 frankoj aŭ egalas pli ol 50-oblon de la ordinara kvanto. Post la fermo de la londona kaj aliaj okcidentaj orborsoj, la diverslokaj aĉetantoj de la kapitalisma mondo ĵetis sin al Parizo kvazaŭ mal-sataj lupoj. Laŭ la raporto de la okcidentaj novaĵoj, ili “trabatis al si la vojon per pugnoj” por enpuŝiĝi en la borson de oro en Parizo, tiel ke estiĝis tie “plena ĥaoso” kaj la borso turniĝis en “terenon por ĥaosa interbatado”. En la ardo de konkura aĉetado, la prezo de oro en Parizo foje saltis ĝis 44 dolaroj por unu unco, multe superante la oficialan prezon de 35 dolaroj.

La gazetaro de la franca burĝaro montris maltrankvile, ke la aktuala financa krizo ne nur estas katastrofo por

*Angulo de la akcia borso de Novjorko. En streĉiteco oni klopodas forvendi siajn akciojn.*



Usono, sed ankaŭ serioza minaco por Francio. La ĵurnalo *Le Figaro* komentis en la 18-a ke la fluga prezleviĝo de oro fakte “egalas al grandmezura devaluto de ĉiuj (okcidentaj) monoj”. Tiel la franko, kiel ankaŭ la dolaro, nun “povas ŝanĝiĝi nur kontraŭ malpli da oro” kaj ĉiam ankoraŭ pli malmulte. La francaj burĝaj ekonomiistoj timis ke devaluto de la dolaro damaĝus la ekonomion kaj komercon de la okcidentaj landoj, inkluzive Francion.

Fronte al tiu kriza situacio, la franca prezidanto Charles de Gaulle kunvokis speciale kabinetajn kunsidojn sinsekve en la 13-a kaj 15-a de marto por diskuti kion fari kun la aktuala financa krizo de la okcidenta mondo. La franca ministro de eksterlandaj aferoj Couve de Murville alvokis la ŝtatojn de la “Komuna Merkato” de okcidenta Eŭropo “akordigi siajn sintenojn rilate al la gravaj problemoj de la sterlingo, dolaro kaj oro.

## MARKO MINACATA DE DOLARO — ĈAGRENO POR OKCIDENTA GERMANIO

Kvankam kun memfido pri sia “forteĝa” ekonomia pozicio, ankaŭ la reganta kliko de Okcidenta Germanio estis timema kaj maltrankvila antaŭ la aktuala financa krizo de la kapitalisma mondo. Ĝi timis ke devaluto de la dolaro ne nur kaŭzos al ĝi perdon pro teno de granda kvanto da dolaroj, sed ankaŭ la marko de Okcidenta Germanio estos minacata pro sia intima rilato kun la dolaro, kaj tio donos ekstran baton al la nun jam malfortiĝanta ekonomio de Okcidenta Germanio.

Kiel raportite, ankaŭ la vento de forvendo de dolaroj kaj aĉeto de oro en la borsoj de oro kaj fremdaj monoj en Frankfurt “ĉiam pli malkvietiĝas”. Pro konsidero de komuna intereso, la centra banko de Okcidenta Germanio ne povis ne aĉeti dolarojn por “subteni la krediton de la dolaro”, kiam ĝia borsa kurzo daŭre faladis. Sed, aliflanke, la aŭtoritatularo de Okcidenta Germanio ankaŭ timis ke enmanigo de tro multe da dolaroj kaŭzos tro grandan perdon okaze de oficiala devaluto de la dolaro kaj tial altigis en la 12-a la mallong-periodan kurzon de dolaroj en interŝanĝo kontraŭ markoj por limigi la enflon de dolaroj en Okcidentan Germanion. Tio montris ke tute mankas al la aŭtoritatuloj de Okcidenta Germanio fido pri la pozicio de la dolaro. La financa ministro de Okcidenta Germanio Franz-Josef Strauss parolis kun teruro en la 16-a pri la ebleco de devaluto de la dolaro kaj rekonis ke tiam ankaŭ la marko “ne povos elteni” kaj Okcidenta Germanio “estos devigata akcepti la rezultojn, kiujn ni klopodas eviti”. *La Mondo* de Okcidenta Germanio montris maltrankvile, ke devaluto de la dolaro donos “drastan baton al la eksporto kaj la tuta ekonomio de (Okcidenta) Germanio”. Kun timemo, ĝi parolis pri tio ke la devaluto de la sterlingo en novembro de la pasinta jaro jam reduktis la eksporton de Okcidenta Germanio je 10% kaj devaluto de la dolaro ankoraŭ pli damaĝos ĝian eksporton.



## RAPIDA DISVOLVIĜO DE LA FINANCA KRIZO, KREPUSKIĜO DE LA OKCIDENTA MONDO

Ĉiuj aliaj kapitalismaj landoj, de la nord-eŭropaj landoj ĝis Italio en suda Eŭropo, de Kanado en Norda Ameriko ĝis Aŭstralio kaj Novzelando en Oceanio, estis forte atakataj senescepte de la aktuala giganta tajdo de konkura elvendo de la dolaro kaj sterlingo kaj aĉetado de oro. Dum la plej alta fluso, rezulte de ekstrema nekonfido pri la usona dolaro, en multaj landoj la borsoj de fremdaj monoj ĉesis funkcii kaj ankaŭ la bankoj interrompis sian negocon pri fremdaj monoj. En Nederlando, Svedio kaj aliaj landoj oni limigis al fremdlandaj vojaĝantoj interŝanĝon de la loka mono per dolaroj kaj sterlingaj funtoj, kaj ankoraŭ aliaj simple rifuzis akcepti dolarojn por eviti eventualan perdon okaze de

ilia devaluto.

La aktuala granda kaj profunda krizo de financo kaj mono en la kapitalisma mondo forte skuas la tutan kapitalisman sistemon. La regantaj klikoj de la kapitalismaj landoj antaŭsentas la alproksimiĝon de la lasta tago de kapitalismo kaj ĉiam troviĝas en terura paniko.

La danĝerega disvolviĝo de la financa krizo en la kapitalisma mondo kaj ĝiaj pezaj batoj donitaj al la imperiismaj landoj pliafoje pruvas la ĝustecon de la instruo de la granda instruanto de la proletaro Prezidanto Maŭ: **“La bazo de la malamiko estas malforta; ĝia interno estas plena de displitiĝo; ĝi apartiĝas de la popolo, havas neforskueblan ekonomian krizon kaj tial estas supervenkebla.”**

# Kontraŭrevoluciuloj de la Kapo ĝis la Piedoj

Nia granda instruanto Prezidanto Maŭ nin instruas: **“Ĉiu ajn, kiu staras en la flanko de la revolucia popolo, estas revoluciulo. Ĉiu ajn, kiu staras en la flanko de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo, estas kontraŭ-revoluciulo.”**

En la lasttempa batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo, la reviziisma renegata kliko de Sovetunio staris tute en la flanko de la usona imperiismo, servante kiel ĝia kompliko n-ro 1 por estingi la flamon de la batalo de nigruloj. Tio ankoraŭfoje malkaŝis ilian senhontan fizionomion de kontraŭ-revoluciuloj de la kapo ĝis la piedoj.

Kiam la usonaj nigruloj leviĝis amase al batalo kontraŭ perforta subpremo, ili tuj malice blasfemis kaj faris ĉion eblan por kalumnii la nigrulan justan batalon kiel “rasajn tumultojn”, “alprenon de blinda perforto”.

Kiam la usona reganta kliko ekspedis dek-milojn da armeanoj kaj policistoj por fari sangan subpremadon al la nigruloj, ili tuj hurais per plena voĉo kaj laŭdis tian barbarajon kiel agon por “restarigi ordon” kaj revenigi “trankvilon”, plenenergie ekskuzante la usonan imperiismon.

Kiam la usona reganta kliko intencis konduki la batalon de la nigruloj sur la t. n. “nepafortan” vojon, ili tuj plenenergie propagandis la “nepafortan” vojon, postulante ke la

nigrulaj amasoj de Usono senarmigu sin antaŭ la kontraŭrevolucia perfortado.

Kiam la usona reganta kliko intencis artifiki la nigrulajn amasojn per trompaĵoj, kia la t. n. “leĝoprojekto de civilaj rajtoj”, ili tuj plenforte distrumpetis ilin por ke la usonaj nigruloj kredu, ke ili estas “cedoj” de la flanko de la usona reganta aŭtoritatularo.

Unuvorte, kiam la usona imperiismo aplikis kontraŭrevolucian duoblan taktikon al la nigruloj, la reviziisma renegata kliko de Sovetunio sekvis ĝin kunage plej strikte ĉe ĉiu paŝo!

Kompreneble ne estis hazarde, ke la reviziisma renegata kliko de Sovetunio elpaŝis por ludi tian farson.

La linio praktikata de tiu bando da perfiduloj ja celas restaŭri kapitalismon en la socialisma mondo kaj protekti la regadon de imperiismo kaj koloniismo en la kapitalisma mondo. Kiel ili povis ne maltrankviliĝi kaj elpaŝi haste por doni helpman manon al la usona imperiismo, kiam ili vidis, ke la batala ŝtormo de la usonaj nigruloj peze batas la reakcian regadon de la usona imperiismo kaj sturmas la reĝimon de imperiismo kaj koloniismo?

Same kiel la usona imperiismo, tiu ĉi bando da perfiduloj ja sidas sur vulkano. Ke la usonaj nigruloj leviĝis por ribeli kaj dispisti la t. n.

(daŭrigo sur p. 52)



## LA POPOLOJ DE URUGVAJO KAJ ALIAJ LATINAMERIKAJ LANDOJ OPONAS DIKTATORECON, MALSATON KAJ EKSPLUATON

Lastatempe, la kontraŭusona batalo de la urugvaja, argentina, bolivia, ekvadora kaj venezuela popoloj estas en nova disvolviĝo. Je la 1-a de majo, dekmilo da laboristoj en la ĉefurbo de Urugvajo Montevideo okazigis manifestacion, kriante sloganojn kia "For la Jankiojn" kaj kondukis bravan batalon kontraŭ la policianoj, kiuj alvenis por subpremi ilin.

En la sama tago, pli ol 10,000 laboristoj en La Paz, la ĉefurbo de Bolivio, ankaŭ okazigis manifestacion kontraŭ la usona imperiismo kaj la diktatora registaro. En Ekvadoro, laboristoj lastatempe disvolvis kontraŭusonatan batalon en kelkaj el ĝiaj ĉefaj urboj. En Buenos-Ajreso, la ĉefurbo de Argentino, kaj en Santa Fe, Tukumán kaj aliaj urboj, laboristoj okazigis lastatempe manifestaciojn unun post alia kontraŭ la kruelaj rabado kaj ekspluatado fare de la usona imperiismo en Argentino.

(daŭrigo de p. 51)

"ordon" de la reakciularo, tio teruris ne nur la sinjorajn moŝtojn en la Blanka Domo, sed ankaŭ la plenmanon da reviziistaj klaŭnoj rajdantaj sur la kolo de la sovetiaj popoloj. Ke kun malamo kaj teruro la reviziisma renegata kliko de Sovetunio rigardas la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo kiel ion krimegan, tio ja devenas de ilia propra reakcia naturo de burĝaro.

Tiuj ĉi perfiduloj ja portas unu saman pantalonon kun sia usona mastro. La katastrofo trafita de la usona imperiismo ja ankaŭ estas ĉagreno por la reviziisma kliko de Sovetunio. Nun, la problemoj, pro kiuj la usona imperiismo plej rompas al si la kapon,

## OKINAŬAJ POPOLANOJ OKAZIGIS MITINGON KAJ MANIFESTACION KONTRAŬ LA USONA IMPERIISMO

En la 2-a de majo, popoloj de Okinaŭa okazigis mitingon kaj manifestacion antaŭ la usona aerbazo en Kadena sur tiu insulo kontraŭ plivastigo de la agresa milito de la usona imperiismo en Vjetnamio. Kaj ili brave batalis kontraŭ la usonaj agresantoj, kiuj venis ilin subpremi.

Tenante ruĝajn flagojn kaj la flagojn de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio kaj kantante la batalkanton *Redonu Nian Okinaŭa-n*, okinaŭaj laboristoj, studentoj kaj junuloj torentis al tiu usona aerbazo tiuposttagmeze, por manifesti sian oponon kontraŭ la agresa milito de la usona imperiismo en Vjetnamio kaj postuli la fortiron de la aviadiloj B-52 el Okinaŭa, kaj ili postulis ke la komandanto de tiu bazo persone aperu antaŭ ili por akcepti ilian proteston.

La aŭtoritatuloj de la usona armeo teruritaĵ de la manifestaciaj amasoj haste alvenigis plene armitajn soldatojn kaj japanajn policanojn kaj jetojn por subpremi kaj minaci la manifestaciantojn. La perforta subpremo tamen pli kolerigis ilin. Ili sentime batalis tre intense kontraŭ la sovaĝaj usonaj soldatoj, plenvoĉe kriante sloganojn, kiaj "Kontraŭ la usona agreso al Vjetnamio!" "Fortiru la usonajn jetojn B-52!" k. a.

estas la fiasko de ĝia agresmilito kontraŭ Vjetnamio, la graviĝo de la krizo de la usona dolaro kaj la ŝtorma leviĝo de la nigrula batalo. Tial la reviziistoj-perfiduloj de Sovetunio tuj klopodas ĉiurimede servi al ĝi. Ili helpas la usonan imperiismon, unue, en ofertado de la trompa "paca intertraktado" por savi ĝin el la fiasko en Vjetnamio; due, en mildigo de la dolaro krizo, ne hezitante eĉ pluapase malfermi por ĝi la merkatojn de Sovetunio; kaj trie, en estingado de la flamoj de la nigrula batalo por protekti ĝian reakcian regadon en ĝia propra lando. Tamen, ĉio ĉi tio estas vana, kiel ajn energie la reviziisma renegata kliko de Sovetunio klopodas por doni helpon. Ĝi povos savi nek la usonan imperiismon, nek sin mem.





## Letero al Malproksimaj Amikoj

Kara amiko,

En via letero vi diris, ke ĉio okazanta en Ĉinio estas nova kaj interesa por vi kaj viaj amikoj. Efektive, la granda proletara kultura revolucio en nia lando akcelas la ideologian revolucio de nia popolo, senĉese aperas novtipaj homoj kaj novaj aferoj, kaj la produktaj rekordoj estas senĉese renovigataj. Priparolindaj kaj konigindaj aferoj estas tre multaj. En tiu ĉi letero, mi rakontos al vi, kiel kamarado Zuo Giafa, laboranto de iu hospitalo de la aerarmeo garnizonanta en Ŝanhajo, noble traktis sian personan malfeliĉon de akcidenta morto de la edzino.

Lia edzino Ĉeng Juĝi estis ĉeflegistino de la sama hospitalo. Je la 15-a de dec. 1967, ŝi estis malfeliĉe, grave puŝvundita de ŝarĝaŭto de la brigado n-ro 401 de la 4-a aŭtogaraĝo de la Ŝanhaja Transporta Kompanio. La malfeliĉa, neatendita informo kaptis kamaradon Zuo Giafa! Li haste rapidis al la ĉambro por urĝa savo, kie kuracistoj, sub la zorgado de la gvidantoj de la hospitalo, estis farantaj ĉiajn klopodojn por savi la vunditon. Vidinte kamaradon Zuo Giafa, la politika direktanto de la hospitalo tuj renkonte iris al li kaj zorgeme diris: “Kara Zuo, la partia komitato de la hospitalo decidis fari ĉion por savi kamaradinon Ĉeng Juĝi, kaj esperas ke vi ĝuste traktos tiun malfeliĉan akcidenton laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.”

Kiel trakti do la neatenditan aferon? Jen sonis en tiu momento en la oreloj de kamarado Zuo Giafa la intima instruo de Prezidanto Maŭ: “**Konsideri ĉion por la interesoj de la popolo sed ne por tiuj de individuo aŭ malgranda grupo; . . . — tio estas nia elirpunkto.**” Li pensis: Kiel ajn granda malfeliĉo trafus min, tio koncernus nur al mi unu persono

kaj ne estas granda afero. Tial li firme respondis: “Estu trankvila, politika direktanto, mi agos certe laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.”

Ĝuste en tiu tempo, iu flegistino rapidis al Zuo kaj diris: “Kamaradino Ĉeng Juĝi jam . . .” Kaj la frazon la flegistino jam ne povis fini.

Zuo Giafa nun estas 52-jara kaj partoprenis la revolucion jam 27 jarojn. Li estas firmvola batalanto provita de malfacilega milita vivo. En tiu malĝoja, dolora momento, li rememoris la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**zorgi la Partion kaj amasojn pli multe ol la individuon, zorgi aliajn pli multe ol sin mem**”, kaj tuj sentis ke lia koro fariĝas senlime vasta. Al la kamaradoj de la 4-a aŭtogaraĝo, kiuj maltrankvile venis por informiĝi kaj konsoli, li serioze diris: “Ne ĉagreniĝu pro mi, mi petas. La plej grava afero restas nun strikte sekvi la grandan strategian aranĝon de Prezidanto Maŭ kaj koncentri nian tutan energion por konduki la grandan proletaran kulturalan revolucion ĝis la fino!” Poste li aldonis: “La akcidento jam okazis neŝanĝeble kaj la kamarado ŝoforo certe estas en granda maltrankvilo. Mi volas viziti lin.”

Antaŭ tiu veterana batalanto armita de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj kamaradoj de la aŭtogaraĝo ĉiuj kortuŝiĝis ĝis larmo. Ili rigardadis kun respekto tiun sennombrajn batalojn partoprenintan veteranan PLA-anon kaj longe ne volis foriri de li.

Nu, ĉi tie vi certe demandos, kiel estis tiam pri la ŝoforo, kiu kaŭzis la akcidenton?

La ŝoforo nomata Luo Ĉangĝuj, kiu iam iris al amika lando por helpi en ilia konstruado kaj estas revoluciulo en la nuna kultura revolucio, estis dolore malĝoja post la akcidento kaj mem iris al la policejo por peti punon. Informiĝinte pri ĉio ĉi tio, Zuo Giafa ekkonsciis profunde sub la instigo de forta klasa amikeco ke ne nur liaj edzino kaj filino estas liaj parencoj, sed ankaŭ la proletaraj revoluciu-

loj estas liaj plej proksimaj parencoj. Li pensis en si: Kamarado Luo Ĉangĝuj estas mia klasfrato, li mortigis mian edzinon pro neatento, sed tio estas nur senintenca kulpo. Mi devas eliri el la interesoj de la tuta klaso kaj la Partio, helpi lin ekkoni sian eraron kaj eltiri lecionon, kaj instigi lin pli bone servi al la popolo.

Tiun vesperon, kiam Zuo Giafa revenis hejmen, li trovis ke ĉio en la ĉambro restas sama kiel en la pasinteco: sur la tablo kuŝas bonorde la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiujn lia edzino ofte legis en sia vivo. Rigardante ĉion ĉi tion, kamarado Zuo Giafa ne povis teni sian koron kvieta. Li ekmemoris sian familian historion. En la damninda malnova socio, liaj prapatroj estis dungitaj kamparanoj, kaj lia patro multe suferis de ekspluato kaj premado de bienuloj, poste malsanis pro tro peza laborado kaj mizere mortis en turmentiĝo sen kuraco. Li mem fariĝis orfo je la 15-jara aĝo, devis labori kiel jar-dungito ĉe bienulo kaj tutjare vivis malpli bone ol brutoj. Lia profunda malamo al la malnova socio pluaŝe vekis lian senlime varman amon al Prezidanto Maŭ kaj lian profundan klasan amikecon al la proletaraj revoluciuloj.

La sekvintan matenon, kontraŭ frosta vento Zuo Giafa kaj gvidantoj de la hospitalo iris al la 4-a aŭtogaraĝo de la kompanio. Vidinte Zuo Giafa, la tieaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj amase ĉirkaŭis lin zorgeme por esprimi al li sian kondolencan. Zuo Giafa diris al ili: “Kvankam mi tre malĝojas pro la perdo de mia edzino, tamen tio absolute ne devas influi la rilaton inter la armeo kaj la popolo.” Post la diro li surpinglis donace ore brilan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ sur la bruston de kamarado Luo Ĉangĝuj. Plie li transdonis al la lasta la ruĝajn trezorajn librojn, kiujn lia edzino studis antaŭ sia morto, kaj diris intime: “Por konduki aŭton oni devas havi stirradon, por revolucii oni ne devas forlasi la penson de Maŭ Zedong. Mi

esperas ke vi kreive studos kaj aplikos la verkojn de Prezidanto Maŭ, kontraŭbatalos egoismon kaj kritikos reviziismon, kaj demetos la ŝarĝon en la penso por antaŭenmarŝi malpeze.”

Per ambaŭ manoj transpreninte la ruĝajn librojn, Luo Ĉangĝuj longe ne povis eldiri eĉ unu vorton pro emociiĝo kaj poste li ekĉirkaŭprenis firme kamaradon Zuo Giafa. Post longa tempo li malrapide levis sian kapon kaj diris: “Mi kore dankas al nia amata Prezidanto Maŭ, kiu edukis tiel noblan personon kia vi. Mi nepre eltiros doloran lecionon el tiu ĉi akcidento.” Tiuj du klasaj fratoj, kiuj multe suferis en la mal-

nova socio, fandiĝis en senlime varma amo kaj fideleco al Prezidanto Maŭ. Kaj inter la ĉirkaŭstarantoj eksplodis hurao: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” Subite la amaso ekkantis kun emociaj larmoj:

*Ja tiel grandaj estas la ĉiel’ kaj ter’*

*Tamen ne kiel estas bono de l’Parti’.*

*Ja tiel intimegaj estas patro kaj patrino’,*

*Tamen ankoraŭ pli ja estas Prezidanto Maŭ.*

*Kaj da bonfaroj estas milo kaj dek-mil’,*

*El ili la plej bona estas la socialism’.*

*Tiel profundaj estas maro kaj river’*

*Tamen ankoraŭ pli ja estas la fratec’ de l’ klas’.*

Kara amiko, kamarado Zuo Giafa estas ordinara revolucia batalanto. Lia komunisma spirito estas frukto de kreiva studo kaj apliko de la penso de Maŭ Zedong. El lia faro vi povas vidi, kiom profunda estas la klasa amo inter niaj armeo kaj popolo!

Kara amiko, mi devas fini mian leteron kaj deziras al vi kaj viaj amikoj bonan sanon!

*Via amiko  
Ajmin*



## Prezidanto Maŭ Sendis por Gvidi Nian Navigadon

Estis malluma nokto. Ŝtormo rulatakis la marsurfacon. Komerca ŝipo el Eŭropo, kies radaro por gvidi la navigadon jam difektiĝis, trovis sin senhelpa inter la Japana kaj Flava Maroj. Kapitano James paŝadis tien kaj reen en la salono. Ĉiuj ĵetis sur lin malpacienca rigardon.

Subite la radiotelegrafisto enpuniĝis tra la pordo portante radiogramon. Tuj leviĝis ekscitiĝo. La kapitano rapide tralegis la depeŝon el proksima haveno de kapitalisma lando kaj fine diris kun indigno: “Ili ne etendas manon al dronanto, sed sendas abundon da diplomatiaj vortoj!” Je eksvingo de la manoj li dispecigis la radiogramon. La lasta strio da espero forvaporigis. Kion fari nun en tia situacio?

En tiu momento, enkuris en la salonon kelkaj maristoj, el kiuj iu maljuna diris: “S-ro kapitano, ni turnu nin al Ĉinio por peti helpon de la lando de Maŭ Zedong...”

“Jes!” eksplodis la aliaj samtempe per krio.

Kun kunŝovitaj brovoj, la kapitano hezitis: “La ĉinaj havenoj estas malproksimaj. Ĉu ni povos trovi helpon tie, kiam ni ne trovis tian el proksime? Pli ol dek jarojn mi ne iris al Ĉinio. Ĉu ili donos al ni helpon?”

“La Ĉinio de Maŭ Zedong estas lando de revolucio, lando de popolo. Ili certe helpos nin!” Laŭte diris la maljuna maristo farante unu paŝon antaŭen. Sub la instigado de la maristoj, la kapitano konsentis sendi depeŝon al ĉina haveno por peti helpon.

Estis ekster ilia imago, ke tre baldaŭe ili jam ricevis respondon de la ĉina haveno: “Via radiogramo ricevita. Faros ĉion por eldanĝerigi vin. Rapide pretiĝu. Ni tuj organizos gvidadon de via navigado.” Kian sinceran helpemon enten-

tiuj mallongaj frazoj! Oni ne povis deteni sin de larmo. “Maŭ Zedong sendis por gvidi nian navigadon!” la maristoj saltis pro ĝojo.

Ricevinte la peton, la ĉina haveno tuj komencis intensan batalon. Por sekurigi la navigadon de tiu fremdlanda ŝipo, ili venigis piloton kaj veteranan, spertan ŝipestron por organizi specialan grupon por gvidi la ŝipon de sur la tero. La grupo plenatente ellaboris projekton por navigado. Sub ĝia helpo la ŝipo rapide orientiĝis kaj rekte veturis al Ĉinio tra furiozaj ondegoj.

En la tagmezo de la sekvinta tago, la ŝipo eniris en rodon de Ĉinio. Kapitano James firme manpremis kun la ĉinaj laborantoj kaj diris: “Dank’ al via senegoisma helpo, ni hodiaŭ saviĝis el danĝero de pereado! Vi estas la plej bonaj homoj en la mondo...”



Antaŭ vesperiĝo, juna teknikisto ĉina surŝipiĝis por ripari la difektitan radaron. Aŭdinte tion la kapitano pensis en si: “Nia radaro estis riparita en kelkaj landoj dum la vojaĝo, sed ĝia funkciado ankoraŭ ne reboniĝis. Ĉu oni sukcesos ĉi-foje?”

Ekster lia atendo, la radaro estis bone riparita post la serioza klopodo de la ĉina teknikisto. La aparato ekzumis mallaŭte kaj glate kaj sur la fluoreska ekrano klare montriĝis diversaj signoj. James ekĝojis kontente kun rideto.

En la mateno de la posta tago, kiam la kapitano ĝuste eliris el sia kajuto, li aŭdis ke la ĉina radara teknikisto ree alvenis. Kun miro li iris al la radara ĉambro kaj rimarkis, ke la ĉina teknikisto laboras tute absorbite. La kapitano nedeteneble demandis: “Sinjoro teknikisto, kial vi bezonas denove fari klopodon?”

Post varma saluto la radara teknikisto respondis: “Via radaro jam estas longe uzita. Iuj akcesoraĵoj devas esti purigitaj kaj aliaj ŝanĝitaj per novaj. Alie, la radaro ne bone funkcios denove post mallonga tempo.”

“Tio estas mia devo,” li daŭrigis. “Ni ĉinoj devas fari ĉion laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. En sia artikolo *Memore al Norman Bethune* li diris: **‘La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro...’** Pro la sekureco de la fratoj-maristoj de via ŝipo, mi venis ĉi tien denove.”

“... Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kaj... ekstreme respondecema sento al la laboro,” James ripetis la vortojn pretervole kaj enpensiĝis. Li estis kortuŝita de la nobla spirito de la ĉina popolo edukita per la penso de Maŭ Zedong. El la eldanĝerigo de lia ŝipo kaj la mallonga parolo de la radara teknikisto, li ekkonis la novan Ĉinion lumigitan de la penso de Maŭ Zedong.



## Letero de Nederlanda Leganto

Vi demandas pri miaj impresoj, opinioj kaj proponoj post lego de la aperintaj numeroj de *El Popola Ĉinio*.

Mi ĵus trarigardis la numerojn de EPĈ kiujn mi posedas. Kaj mi nepre devas diri, ke via gazeto faras gravan servon.

La unuan komprenon pri la Granda Proletara Kultura Revolucio nun kondukata en Ĉinio mi ekhavis pere de artikolo citita el *Hongqi* en la septembra-oktobra numero de 1966 kun la titolo *Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio*.

Depost lego de tiu artikolo mi tre atentis la artikolojn aperantajn en EPĈ pri la granda kultura revolucio.

Mi opinias, ke la Granda Proletara Kultura Revolucio estas evento de mondhistoria signifo, kaj ke ĝi povas doni multajn lecionojn al la popoloj de la tuta mondo.

Temas pri lecionoj de marksism-leninismo en plej vigla, plej aktuala formo.

El la artikoloj aperintaj en EPĈ dum 1967 mi plej bone memoros la verkojn de Maŭ Zedong: *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune*, *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* kaj la artikolojn *Perfido al la Proleta Diktaturo Estas Esenca Elemento de la Libro “Memkulturo”* kaj *Granda Revolucio de Ĉinio kaj la Granda Tragedio de Sovetunio* el *Hongqi* kaj *Renmin Ribao*.

Kial? Estas grava kial.

Loĝante en Nederlando, en parto de Eŭropo kiu longe restis ekster la monda batalo por faligi imperiismon, oni tre malfacile akiras kom-

prenon pri la nuna situacio de la mondo kaj pri la estonta evoluo de la homaro.

En nia parto de Eŭropo estas stadio en kiu la klasaj kontraŭdiroj momente disvolviĝas malrapide; ankoraŭ ne venis la tempo por depreni regpotencon per armita batalo.

En tia kondiĉo, naskiĝis tre multaj reviziismoj en Eŭropo, de ĉiuj formoj, de social-demokratoj de la II-a Internacio ĝis la modernaj reviziismaj partioj de “Moskva” tipo, kaj eĉ trockismo montras sian malbelan kapon ĉe ni.

Estas neeble akiri komprenon pri la vero de marksismo-leninismo, se oni aŭskultas nur la vortojn de ĉi tiuj renegatoj.

La studo de la penso de Maŭ Zedong nun ebligas al ni en Eŭropo ekkoni veran marksismo-leninismen en plej aktuala, plej bataltaŭga formo. Kaj por ni precipe utilaj estas la kritikaj artikoloj en *Renmin Ribao* kaj *Hongqi* pri la ĉina plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj liaj lakeoj kia Taŭ Ĝu. Ili estas de la sama speco kiel la eŭropaj reviziistoj kiuj klopodas vendi la saman ideologian varon, kies ĉefa enhavo estas senlima malamo al la proleta klaso.

La historio neevitebla alproksimiĝas paŝon post paŝo al kompleta disfalo de imperiismo kaj al starigo de socialismo en la tuta mondo.

La nunan situacion de Eŭropo bonege resumis Prezidanto Maŭ Zedong: **“La proletaro kaj laboranta popolo de Eŭropo, norda Ameriko kaj Oceanio sin trovas en nova vekigo.”** Tio estas plena vero. Nun estas tempo decidi, ĉu oni estos kun la vekigintaj amasoj kaj klopodos organizi ilin kaj altigi ilian politikan konscion por batali kontraŭ la malnova ekspluata sistemo — aŭ ĉu oni daŭre perfidos ilin, blinde ripetados ke “Marks ne estis prava” kaj klopodas amikiĝi kun la burĝaro kaj etburĝaro.

Via gazeto donas bonegan instruon kio estas vera marksismo-leninismo, la penso de Maŭ Zedong, kiu estas aplikata en la ĉiutaga kaj multflanka praktiko en Ĉinio.

## Sur la kovrilo:

Prezidanto Maŭ sur Ginggang-montaro

## Sur la dorskovrilo:

La klarigisto ĉe la pasejo de Huangjanggie sur Ginggang-montaro, kiu siatempe estis batalanto de la Ruĝa Armeo, entuziasme rakontas al la junuloj la revolucian historion de la armita defendo de Huangjanggie fare de la Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo kaj la popolo de Ginggang-montaro, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, en la 30-a de aŭgusto 1928, por ke la revolucia spirito de Ginggang-montaro estu heredigata de generacio al generacio kaj ĉiam floru.

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (121) 1968

## Ĉefa Enhavo

Deklaro de Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de CK de KPĈ, por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo

Revoluciaj Popoloj de la Mondo Aklamas la Deklaron de Prezidanto Maŭ

Granda Kuraĝigo al la Komuna Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo

Batalu, Fratoj Nigruloj en Usono!

La Batalo de la Usonaj Nigruloj en Vigla Disvolviĝo

La Mizera Stato de Usonaj Nigruloj

Insigno kun Portreto de Prezidanto Maŭ (*poemo*)

Novaj Kontribuoj de Labormodeloj

Revolucii por Ĉiam Firme Sekvante Prezidanton Maŭ

La Naŭa Laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno

Nova Provo

Vivu la Revolucia Spirito de Ginggang-montaro

Laŭdoj pri la "Tri Popularaj Artikoloj"

Okazintaĵoj en la Ginan-a Dizel-lokomotiva Fabriko

Rimedo por Preventi Degeneron de Terpomo Trovita

Altprodukta Hibrida Sorgo

Firmaj Defendantoj de Phou Khouth

Financa krizo Uraganas tra Okcidenta Eŭropo kaj Norda Ameriko

Kontraŭrevoluciuloj de la Kapo ĝis la Piedoj



# *La Bataluragano de Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo*

Ekstreme giganta revolucia forto ja troviĝas latente en la pli ol dudek milion usonaj nigruloj. Por libereco kaj emancipiĝo, ili senĉese levas novajn batalŝtormojn kontraŭ perforta subpremo, kiuj envolvas cent kaj dekojn da urboj de Usono. La nigruloj certe frakosas la katenojn sur sia korpo kaj definitive enterigos la usonan imperiismon.



Je la fino de aŭgusto 1963, pli ol ducent mil usonaj nigruloj kaj pornigrulaj blankuloj faris grandiozan "Marŝon por Libero" en Vaŝingtono por oponi kontraŭ rasdiskriminacio.



En julio 1964, la nigruloj en Harlem-kvartalo de Novjorko ludis la preludon de perforta batalo kontraŭ perforta subpremo. La nigruloj brave kaj obstine luktis vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe kun la armitaj soldatoj kaj policanoj sen timo al sinfero.



En la lasta tagdeko de julio 1967, la nigruloj en Detroit bruligis pli ol 1,300 fajregojn en la tuta urbo, tiel ke ĝi kolapsis en la fajra maro.

Manifestacias usonaj nigruloj por oponi la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio. Sur la tabuloj: "Venku la usonan imperiismon!" "For la usonan imperiismon! For la usonan imperiismon!"





La soldatoj kaj policianoj, senditaj de la usona reganta kliko por subpremi la nigrulojn, ricevis indajn punojn de la sentimaj nigruloj kaj fuĝis en paniko.



Kun forta indigno kontraŭ la reganta kliko kaj la rasistoj de Usono, la usona nigrulino sentime pugnobatas la reakcian policianon, kiu subpremas la nigrulan batalon.

